

# EL POPOLA ĈINIO

中國新道

11  
1998

ISSN 0032 - 4361



Fruktodona 83-a Universala  
Kongreso de Esperanto

Adiaŭo al la sistemo de bonstatiga  
domdistribuo



En aŭtuno

Foto de CHANG MING

## INTER NI

*En la fruktodona 83-a UK naskiĝis nova estraro de UEA. Elkoran gratulon al ili. Ni deziras, ke la nova estraro pli antaŭen puŝu la E-movadon en la tuta mondo.*

*Ni jam raportis pri la loĝdomoj de ĉinoj. En tiu ĉi numero "Adiaŭo al la sistemo de bonstatiga domdistribuo" koniĝas la nunan staton de reformado pri ĉina domdistribuo. Same kiel en aliaj landoj, la stato de loĝdomoj en Ĉinio strikte rilatas al ĝia ekonomia disvolviĝo. Pro la landa specialeco kaj planizita ekonomio, la antaŭa sistemo pri domdistribuo en Ĉinio estis diferenca de tiu de aliaj landoj. Nun en la situacio de merkata ekonomio ĉinoj sperdas transiron de luo al aĉeto de loĝdomo. Sed pro la malalta salajro de granda parto de ĉinoj nepre necesas speciala politiko,*

*por ke ordinaraj ĉinoj povu aĉeti por si privatan domon — jen celo de la reformado de domdistribuo.*

*En reformado la vivo de ĉinoj ŝanĝiĝas multflanke, kaj ni daŭre koniĝos tion en venontaj numeroj.*

*"Akvoutiliga konstruado en Tibeto" raportas pri la projekto, kiu favoros Tibeton en elektroproduktado, terkulturo kaj brutobredado.*

*En la vastega Ĉinio ne mankas belaj pejzaĝoj, interesaj moroj kaj freŝaj aferoj, kiuj ofte aperas en nia revuo. En tiu ĉi numero vi trovos ankaŭ tiajn raportojn, ekz. "Lando de virinoj", "Mongola kuracistino Wu Lan" kaj "Ĉina mono antaŭ 2 000 jaroj". Ili estas legindaj.*

**La Red.**

# El Popola Ĉinio

11 [482] 1998



Dai Song'en, ĝenerala sekretario de la Ĉina E-ligo kaj vicĉefredaktoro de EPĈ, intime parolas kun K. Enderby, gratulante pro lia nova ofico de prezidanto de UEA

Foto de Liu Sigong

## EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P. O. Kesto 77,

Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:

+86-10-6832 1808

Retpoŝto:


epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/elpopolacxinio>>

# ENHAVO

- 2 INTER NI
  - 4 **FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:**  
Adiaŭo al la sistemo de bonstatiga domdistribuo
  - 6 **EKONOMIE:**  
Akvoutiliga konstruado en Tibeto; Kurantaj aferoj
  - 8 Flugo al la spaco
  - 12 **ORIGINALE VERKITAĴJ:**  
Nia konstante varianta mondo
  - 13 **POR KOMENCANTOJ:**  
La mantrikita kotonŝtrumpeto
  - 14 Mia aktivado, favore al la Kampanjo 2000
  - 15 **ESP-NOVAĴOJ**
  - 16 Fruktozona 83-a Universala Kongreso de Esperanto
  - 20 **JUNULARO:**  
Iom pri filmoj
  - 22 Skulptaĵo el tajlitaj porcelanaj pecoj
  - 24 **KORESPONDI DEZIRAS**
  - 25 **EN ĈINAJ URBETOJ:**  
"Lando de virinoj"
  - 28 Mongola kuracisto Wu Lan
  - 29 **VESTOJ DE ĈINAJ NACIOJ:**  
Kolorriĉaj vestoj de mongoloj
  - 32 Ĉi elektis pli taŭgan preventmetodon
  - 33 Virina mezlernejo en aŭtonoma regiono
  - 35 Flankenglitado de kuraĝuloj
  - 36 **ĈINA KULTURO:**  
Salo kaj la ĉina historio
  - 38 Ĉina mono antaŭ 2 000 jaroj
  - 40 La sorto-decida ekzameno
  - 42 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
  - 44 **ORDINARAJ ĈINOJ:**  
Posedanto de kaĉo-manĝejo
  - 46 Ĉiopova varo (Popolrakonto de huj-nacio)
  - 48 **TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:**  
Kiel preventi infektan malsanon en Ĉinio?
  - 50 **POR VIA SANO:**  
Sanprotekto en vintro
  - 51 **ĈINAJ METIARTAĴOJ:**  
Griloj sur folioj
  - 2 En aŭtuno
- SUR LA DORSKOVRILO:**  
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]  
Floro; Stepa papaveto



## Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

1. Tibeto (p. 6)
2. Zhejiang-provinco (p. 15)
3. Sichuan-provinco (p. 25)
4. Jiuquan (p. 8)
5. Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono (p. 35)

# Adiaŭo al la sistemo de bonstatiga domdistribuo

de JI PING

**D**ECEMBRE de 1978 Ĉinio ekpraktikis la politikon de reformado kaj pordomalfermo. En la pasintaj 20 jaroj okazis grandaj ŝanĝiĝoj. Multaj aferoj, kiujn oni ne kuraĝis imagi nek povis fari en la sistemo de planizita ekonomio, fariĝis realaĵoj en la sistemo de merkata ekonomio. Ni ekzemplu la sistemon de domdistribuo, strikte



Nova loĝkvartalo en Pekino

rilatan al la interesoj de la popolanoj. Nun ĝi transiras iom post iom de luigo al vendo, alivorte, oni adiaŭos la bonstatigan domdistribuon.

## MANKOJ DE LA ANTAŬA SISTEMO

Dum dekoj da jaroj la ĉina registaro investis por konstrui loĝdomojn, kiuj poste distribuiĝis al loĝantoj en maniero de bonstatigo. De la 80-aj jaroj ankaŭ iuj entreprenoj konstruigis loĝdomojn per sia investo, tamen, ĝenerale, ĉinaj loĝdomoj apartenas al la ŝtato. Sekve de tio, preskaŭ ĉiu stablo havas specialan sekcion pri domdistribuo, kiu enlistigas ĉiujn dompetantojn laŭ ties aĝo, servodaŭro, ofico kaj nombro de familianoj. Akirinte la uzrajton de loĝejo, la loĝantoj devas pagi nur tre malmulte da mono por la luado.

La supre menciita sistemo ludis certagradan rolon por solvi la malfacilon en loĝado al la ŝtaticistoj kaj laboristoj de Ĉinio. Kun loĝantara kresko jaro post jaro serioziĝis la problemo de loĝdomo kaj pli kaj pli evidentiĝis la mankoj de la sistemo. Antaŭ ĉio ĝi estas tro granda financa ŝarĝo por la ŝtato. Ĉiujare la ŝtato elspezis grandan monsumon por konstrui loĝdomojn, sed ĝi neniom da repago ricevis kaj la monsumo ne kaŭzis utilan cirkulon. Fakte, la loĝdomoj konstruitaj per investo de la ŝtato ne kontentigis bezonon de la urbanoj. Laŭ statistiko, la pokapa loĝareo de la ĉinaj urbanoj en 1979 estis nur 3.6 kvadrataj metroj.

En praktikado de la politiko, ke la ŝtato monopoligis domdistribuon, okazis iaj maljustaĵoj. En iuj stabloj la nombron de distribueblaj loĝdomoj sciis nur tre malmultaj kaj iuj avantaĝoj estis prifraŭditaj. Pro diversaj kaŭzoj iuj trigeneraciaj familianoj kune loĝis en sama ĉambro, dum aliaj familioj havis kelke da loĝejoj. Ofte videblis, ke por esti favorataj en domdistribuo, oni devigite

regalis koncernajn respondeculojn, donacis valoraĵojn al ili. Iuj fakaj laborantoj loĝis en domoj distribuitaj de iliaj establoj, kio restriktis ilian transposteniĝon, dum iuj establoj ne havis la kapablon liveri loĝdomon al tiuj, kiuj urĝe bezonis ĝin, tial ili devis kun granda bedaŭro permesi transposteniĝon al la lastaj.

## REFORMADO DE LA SISTEMO

En 1980 komenciĝis reformado de la sistemo de bonstatiga domdistribuo en Ĉinio. Krom investo de la ŝtato, necesas ankaŭ tiu kolektita de diversnivela lokaj registaroj, grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj, sciencaj entreprenoj kaj lernejoj.

En Wuhan, ĉefurbo de Hubei-provinco, estas fondita loĝdom-konstrua kooperativo iniciatita de ordinaraj laboristoj. Helpate de dombiena kompanio ĝi kolektas monon kaj konstruas loĝdomojn por si mem. Ĝi mem administras la dombienon kun certa avantaĝo donita de koncerna departemento. Similaj kooperativoj fondiĝis ankaŭ en Ŝanhajo, Pekino kaj Tianjin.

Dank' al diversflanka penado, iom post iom mildiĝis la streĉeco de loĝado de la ĉinaj urbanoj. Ĝis 1997 en la ĉinaj urboj estis konstruitaj loĝdomoj kun plankareo de pli ol tri miliardoj da kvadrataj metroj. Kaj la pokapa loĝareo de la ĉinaj urbanoj kreskis de 3.6 kvadrataj metroj en 1979 al 9 nun.

Reformado de la sistemo iras malrapide. Ĝis nun ankoraŭ ne estas perfekta modelo por tio kaj diversaj manieroj estas provataj por solvi la problemon.

En Shandong-provinco la ŝtatoficistoj kaj laboristoj ĉiumonate ricevas subvencion je 25-30% kiom la salajro por aĉeti loĝdomon.

En Guangdong-provinco oni disdonas la rilatan subvencion por unu fojo al la ŝtatoficistoj kaj laboristoj por faciligi al ili aĉeton de loĝdomo.

En Pekino oni vendas ŝtatajn loĝdomojn sub avantaĝaj kondiĉoj de depreco, servodaŭro kaj produktokosto.

Efektive, vendiĝas ne ĉiuj loĝdomoj de la ŝtato. Kvanto da loĝdomoj de la ŝtato estas luigataj en paŝopostpaŝa altigo de lupago. Kompreneble, oni aĉetas loĝdomon laŭvole.

## VERSIOJ PRI LA REFORMADO

La ŝanĝiĝo de la sistemo de bonstatiga domdistribuo kun postulo de malalta lupago en la sistemon kun postulo de alta lupago aŭ vendo kontraŭ granda monsumo vekis malsamajn versiojn ĉe ĉinaj urbanoj.

Iuj diris: "Antaŭe nia salajro ne inkluzivis la elspezon por loĝdomo. Nun malfacilas por ni aĉeti

loĝdomon kontraŭ granda monsumo." Ili plejparte havas malaltan enspezon aŭ vivas emeritan vivon. Ili timas, ke la aĉeto kaŭzos malfacilojn al ilia ĉiutaga vivo, ĉar ili ne havas sufiĉe da mono por tio. Eĉ se iuj el ili estas pagipovaj por loĝdomo, eble la mono estas ŝparita de ili dum dekoj da jaroj.

Por plejparto de la junuloj kaj personoj kun alta enspezo dezirindas aĉeti loĝdomon. Iuj junuloj deziras tion pro tio, ke ili estos liberaj de loĝdoma restrikto, kiam ili elektos okupon por si. Kaj multaj personoj kun alta enspezo deziras aĉeti domon en loĝkvartaloj de la urba centro aŭ ĝardeneskan loĝdomon en la kvietantaŭurbo.

Malgraŭ ke la ĉinaj urbanoj komprenas la reformadon aŭ ne, ĝi iros senhalte, kun la celo eksciti la konsumon kaj plirapidigi konstruadon de loĝdomoj kaj doni pli bonan vivmedion.

## KION FARI EN LA ESTONTECO?

En la lasta duonjaro de 1998 la ĉina registaro ne plu praktikos la sistemon de bonstatiga domdistribuo, sed laŭpaŝe efektigos la sistemon de dom-aĉetado. Principe, novaj malmultekostaj loĝdomoj kun praktika uzebleco vendiĝos kaj ne estos luigataj. Malsamaj politikoj praktikiĝos al familioj kun malsamaj enspezoj en liverado de loĝdomoj. La familioj kun plej malalta enspezo luos per malalta pago loĝdomojn liveritajn de la registaro aŭ establo; la familioj kun mez- kaj malalta enspezoj aĉetos malmultekostajn loĝdomojn kun praktika uzebleco; kaj la familioj kun alta enspezo aĉetos aŭ luos loĝdomojn je merkata prezo.

Dum kelka tempo en la estonteco oni konstruos ĉefe malmultekostajn loĝdomojn kun praktika uzebleco kaj laŭeble malaltigos la koston, cele konformigi la prezaron de tiuj loĝdomoj al la aĉetpovo de la familioj kun mez- kaj malalta enspezoj.

La reformado de lupago identiĝos kun la pagipovo de la ŝtatoficistoj kaj laboristoj kaj kombiniĝos kun altigo de iliaj salajroj. La lokaj registaroj parte aŭ tute ne postulos la lupagon de la emeritoj kaj ricevantoj de socia monhelpo, kiuj havas malfacilon en la vivo. Loĝdomoj de la ŝtato vendiĝos, principe, kontraŭ la produktokosto. La mono por aĉeti loĝdomon venos ĉefe el salajro, komuna fonduso por loĝdomo kaj individua kredito. En iuj lokoj oni disdonos al la ŝtatoficistoj kaj laboristoj la fonduson por konstrui loĝdomojn kiel subvencion por loĝado.

Reformado de la sistemo de bonstatiga domdistribuo estas tasko sufiĉe peza kaj komplika. Por fini ĝin, kompreneble, necesas kompare longa tempo. ■

98/7191/d



Akvoutiliga konstruaĵo sur la kanalo Jiangdang

# Akvoutiliga konstruado en Tibeto

de ZHANG XIAOWEN

**N**I raportistoj restis en Tibeto dekelkajn tagojn. Ni iris laŭ la rivero Yarlung Zangbo kaj multe sciis pri la rivero.

Ĝi estas patrino rivero por la tibetanoj. La meza baseno de la rivero kaj ĝiaj du branĉoj, Nianchu kaj Lhasa, formis longan mallarĝan regionon kun bonegaj naturkondiĉoj kaj evoluanta agrikulturo. Starante sur la teraso de Yongbulakang, la plej malnova templo de Tibeto, kaj montrante kampojn, iu maljuna lokano diris: "Tie estas la plej malnova agro de Tibeto." Sub la blua ĉielo verdas plantoj, la rivero Yarlung Zangbo nutras la kampojn.

Kompreneble, la rivero ne nur donis al tibetanoj tiun bonon, sed devas kaj povas ankaŭ kontribui pli multe. En 1991 por protekti la medion kaj utiligi akvon de la rivero, la registaro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono decidis konstrui seriojn da konstruoj en la longa mallarĝa regiono. La projekto inkluzivas 220 erojn kaj bezonas investon de miliardo da janoj. Oni nomas la projekton "unu rivero, du branĉoj". Ĝi rilatas al 18 gubernioj

kun 798 600 homoj kaj tuŝas multajn kampojn, kiel akvomastumado, brutobredado, terkulturo, forstkulturo, energio, trafiko kaj scienco.

En Tibeto ni ofte aŭdis tiajn vortojn: "Arboj kaj grenplantoj suferas ne de malvarmo, sed de trosekeco." Eĉ en tia akvoriĉa regiono, irigacio ne estas facila. Tial, la plej multaj eroj de la projekto estas akvoutiligaj konstruaĵoj, inkluzivantaj grandajn akvokonservejojn kaj diversajn kanalojn. Qionĝi-gubernio estis konata kiel la plej malriĉa gubernio de Tibeto, antaŭe kamparanoj eĉ batalis inter si pro akvo. Tamen nun ĝi estas prospera. La akvobaraĵo dividas la valon, en la supra baseno estas brila akvo, kaj en la malsupra bone kreskas sekalo. S-ino Fan Aiping, vicestrino de la gubernio, diris, ke antaŭ du jaroj la akvokonservejo estis finkonstruita, de tiam ĝi nutras la kampojn. La klimato estas bona, pluvo plenigas la akvokonservejojn, kaj la produktokvanto de greno altiĝas. Ŝi diris, ke lastjare tie iu kamparano rikoltis 8 250 kg da tritiko ĉiuhektare, antaŭe nur 1 500-2 250 kg.

En la akvoutiliga konstruejo de Manla ni vidis

laborantajn oficirojn kaj soldatojn de trupo de inĝenierio. Ĝia estro Chen diplomiĝis el inĝenieria instituto. Li diris, ke li multfoje partoprenis akvoutiligan konstruadon, tamen unuafoje en loko 4 260 metrojn super la marnivelo. Tie la geologia strukturo estas komplika, la klimato influas la konstruadon. Malgraŭ tio, ili garantias la kvaliton de la konstruaĵoj. Li diris, ke ili finos la konstruadon antaŭ la jaro 2000, ĝia ĉefa rolo estos irigacii kaj produkti elektron.

Krom konduki akvon por irigacio, por solvi la problemon de trinkakvo, oni ankaŭ fosis profundajn putojn en loko, al kiu mankas akvo aŭ kies akvo estas malbonkvalita. En Xigaze situas Kaga-vilaĝo kun 800 homoj, tie en akvo estas fluoro kaj arseno, pro tio la dentoj de la vilaĝanoj flaviĝis, eĉ la ostoj deformiĝis. En 1992 laŭ la projekto "unu rivero, du branĉoj" oni fosis putojn tie kaj instalas akvokondukan tubon, de tiam la vilaĝanoj povas trinki klaran akvon.

Tre ĉarmaj estas pejzaĝoj ambaŭflanke de la vojo de Lhasa al Zedang, ĉefurbo de Shannan-



**Kampoj nutrataj de la rivero Yarlung Zangbo**

regiono. Unuflanke de ĝi estas Yarlung Zangbo, laŭ kiu staras arbaro kiel rubando inter la blua ĉielo kaj verda akvo. Sur monumento ĉe la rivero troviĝas tiaj vortoj: "Protekta arbaro de Zedang staras ĉe la suda bordo de Yarlung Zangbo... longas je 20 km, larĝas je 70 metroj..." La tibetanoj fieras pri la verda rubando, ĉar planti arbojn tie estas malfacile. Laŭdire, de post la 60-aj jaroj oni

senĉese plantis arbojn, tamen plejparto mortis. Malmultaj arboj ne povas bari agreseman sablon. Post la lanĉo de la projekto "unu rivero, du branĉoj" en 1991, kulture arbaron fariĝis unu el la ĉefaj eroj, kiun garantias la financo kaj regula administrado. Dum sezono de arboplantado, krom forstistoj, ankaŭ ŝtatoficistoj kaj lernantoj partoprenas la plantadon. Multaj arboj en la loko estis plantitaj post 1991. Kvankam ne tre altaj, tiuj poploj kaj salikoj fariĝis arbaro. En 1997 dank' al ili, reduktiĝis damaĝo de sabloŝtormo al Gongga-flughaveno. Kvankam la areo de forstoj kaj flaŭro estas ankoraŭ malgranda, tamen ili parte mildigas sabloŝtormon, regas erozion kaj bonigas la ekologian medion. ■



**La Chengdu-a Bazaro de Herbdrogoj**

## Kurantaj aferoj

● Dum 10 tagoj post la 15-a de junio 1998, sur la fervoja linio de Pekino al Kantono oni faris provadon levi rapidecon de trajno kaj kreis la ĉinan rekordon de 240 km ĉiuhore.

● La internacia flughaveno de Hongkong ek-servis en la 6-a de julio.

Oni ekkonstruis la flughavenon en decembro 1992. Por la finita parto oni jam uzis 155 miliardojn da Hongkong-aj dolaroj. La flughaveno estis konstruita sur tero formita per plenigo de

marmalprofundaĵo, kaj ĝia flugoparko areo je 1 248 hektaroj. Laŭ plano ĝia transporta kvanto de pasaĝeroj atingos 87 milionojn da homoj kaj ĉiujare, kaj tiu de varoj 9 milionojn da tunoj.

● Sichuan-provinco estas ĉefa produkto de ĉinaj herbdrogoj. Inter la pli ol 600 herbdrogoj de Ĉinio 370 estas produktitaj en Sichuan.

En Chengdu, ĉefurbo de Sichuan, oni konstruis grandan bazaron de herbdrogoj, multe da herbdrogoj el Sichuan koncentriĝas tie, kaj oni vendas ilin al la tuta lando, inkluzive de Hongkong, Makao (Aomen) kaj Taiwan, kaj ankaŭ al landoj de Sudorienta Azio.

# Flugo al la spaco

**E**N 1957, kiam la unua artefarita satelito de Sovetunio flugis en la spaco, Mao Zedong, la unua prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, diris: "Ankaŭ ni devas havi propran artefaritan sateliton." Li spertis militojn kaj konsciis la gravecon de scienco kaj tekniko por nacia defendo. Unu el liaj famaj tezoj estas: "Kiu estas estiĝinta en scienco kaj tekniko, tiu estos atakata." Ĝuste tiam la spaca tekniko de Ĉinio komencis disvolviĝi.

## IRI PROPRAN VOJON

La 24-an de aprilo 1970, per la transporta raketo Changzheng-

1 Ĉinio lanĉis sian unuan artefaritan sateliton Dongfanghong-1. La 26-an de marto 1998, per Changzheng-C2 ĝi lanĉis du "iridiajn satelitojn" al la malalta tergloba orbito. Dum la pasintaj 28 jaroj, 50 fojojn estis flugigitaj la raketoj Changzheng produktitaj de Ĉinio mem. Nun Ĉinio havas 9 specojn de tiaj raketoj, kies transporta povo al la sinkrona orbito atingas 5 tunojn kaj al la malalta tergloba orbito 9.2 tunojn. Ĉinio posedas la teknikojn de hidrogen-oksigena motoro, duafoja startigo de motoro en vakuo, lanĉo al celpunkto, observo kaj regado, kunligado de raketoj, transporto de pluraj satelitoj per

unu raketo ktp.


Tamen en la komenco multaj ĉinoj, inkluzive de iuj aŭtoritatoj, ne komprenis, kial Ĉinio, estiĝinta en ekonomio kaj malforta en tekniko, multe elspezas por la avangarda scienco pri raketo kaj artefarita satelito.

La praktiko en la pasintaj 40 jaroj pruvis: La ĉina spaca tekniko, kies simbolo estas transportaj raketoj Changzheng en serio kaj artefaritaj satelitoj Dongfanghong en serio, profunde influas la ekonomion, socian vivon, nacian defendon kaj aliajn kampojn de Ĉinio. La spaca tekniko ne nur simbolas, sed ankaŭ antaŭenpuŝas la sciencan kaj


ekonomion de la ŝtato. Krom spaca aktivado, neniu alia projekto bezonas subtenon de tiel multaj flankoj kaj vekas la atenton de centoj da milionoj da homoj kaj diversaj amas-komunikiloj.

Ĉinio mem faras ĉion en la spaca aktivado. Je la komenco Ĉinio estis helpata, kaj poste oni ne plu donis novan teknikon al ĝi. En la pasintaj 40 jaroj la ĉina spaca aktivado spertis malsukcesojn kaj malfacilojn, tamen progresis.

## Sciencistoj traktantaj datenojn de transporta raketo







Lanĉo de la transporta raketo Changzheng-C2

### TRI SATELIT-LANĈAJ CENTROJ

En 1958 la unua satelit-lanĉejo de Ĉinio konstruiĝis en Jiuquan (Ĝiŭĉjŭan) en nordokcidenta dezerto. Poste fondiĝis satelit-lanĉaj centroj en Taiyuan kaj Xichang. Nun tiuj tri centroj povas lanĉi diversajn spac-navigilojn.

En Jiuquan oni lanĉas ĉefe satelitojn eksperimentajn kaj aplikajn per la raketoj Changzheng al la orbitoj meza, malalta kaj oblikva. La centro en Taiyuan lanĉas satelitojn al la malalta kaj ekstrema orbitoj, ekz. la unuan ĉinan meteo-sateliton

Fengyun-1 en la suna sinkrona orbito. Tiu en Xichang lanĉas ĉefe satelitojn por aliaj landoj, kaj la internacia spaca rondo nomas ĝin "Orienta Houston".

Nun Ĉinio havas observan kaj regan reton por lanĉi, flugigi kaj revenigi satelitojn en orbitoj proksimaj al la tero kaj en sinkronaj orbitoj suna kaj tergloba.

### EN LA INTERNACIA Merkato

En internacia konferenco pri komerco de spaca aktivado en la 80-aj jaroj, oni diris: "Ĉinoj venas nur kun oreloj", "Se vi (ĉinoj) deziras komercan intertraktadon, preparu dokumenton 1-

colo-dikan."

La ĉina delegacio preparis 1-colo-dikan proponan dokumenton post peniga laborado. Kaj ili subskribis sian unuan kontrakton.



La 7-an de aprilo 1990 la raketo Changzheng-3 lanĉis sateliton Azio-1 de Hughes-kompanio de Usono — sukcesis la unua komerca satelita lanĉo de Ĉinio. Tiu lanĉo rompis la rekordon de precizeco de orbito-eniro de 32 similaj satelitoj produktitaj de la kompanio.

Kiam Ĉinio debutis en la internacia spaca merkato, ĝia plej potenca raketo Changzheng-3 kapablis transporti nur mezgrandan sateliton. La ĉinaj fakuloj elpensis projekton: Changzheng-C2 estu meĉo kaj 4 helpaj raketoj estu ligitaj al ĝi, tiel ĝia transporta povo povas atingi 9.2 tunojn. Post detala argumentado oni subskribis grandan kontrakton: lanĉi sateliton Optus per la kunligitaj raketoj.

En lanĉado de satelito eĉ eta mispaŝo povas kaŭzi malsukceson. Tiufoje ĉinoj jam preparis florojn por festi la sukceson, tamen la raketo kaj satelito eksplodis. Koncernaj teknikistoj detale esploris pli ol dekmilon da eroj de la raketo kaj starigis rigoran kontrolan programon. La malsukceso donis valoran materialon al la ĉinaj teknikistoj kaj inspiris ilin pli diligente labori por venonta sukceso.


Nun Ĉinio kapablas lanĉi diversajn satelitojn al diversaj orbitoj. Inter 1990 kaj 1997 Ĉinio lanĉis 7-9% da satelitoj de la internacia merkato.

El la ĉinaj transportaj raketoj Changzheng-B3 kaj Changzheng-C2-SD estis produktitaj laŭ la merkata bezono. Surbaze de posedataj teknikoj, ĉinaj teknikistoj sekvis tion: projekto de raketo — kontrakto — kredito — produktado. Jen vojo gvidata de la merkato, kiu progresigas la altan teknikon. ■



Antaŭ lanĉo






La telemezura kosmoŝipo Yuanwan



Kosmonaŭtikaj fakuloj en la Jiuquan-a Satelit-lanĉa Centro



Estonte Ĉinio havos sian kosmonaŭton.



Observado de raketo

# Nia konstante varianta mondo

de LLUIS ARMADANS I MARFA (Hispanio)\*



La aŭtoro

ENKONDUKO: Mi povas certigi al vi, ke tiu ĉi rakonto estas el la reala vivo. Temas pri serio da sinsekvaj okazintaĵoj travivitaj de du kuzoj, el kiuj unu naskiĝis en granda urbo Barcelono kaj la alia en malgranda vilaĝo Moia, situanta 58 kilometrojn norde de Mediteraneo.

Iatempe kamparanaj familioj estis multnombraj. Fraŭlinoj ofte ĝoje laboris kiel servistinoj en somere feriantaj familioj. Riĉuloj poste ĉiam klopodis kunporti ilin al la urbo, kie ili povis ŝanĝi laboron, edziniĝi kaj resti dumvive. Tio okazis al fraŭlino, kiu lasis en la vilaĝo sep gefratojn. Sed rilatojn kun preferata fratino ŝi daŭrigis kaj ambaŭ interŝanĝis vizitojn eĉ post edziniĝo kaj patriniĝo. La du malgrandaj kuzoj estis niaj protagonistoj. La kamparano havis pliaĝan fraton kaj la urbano du pliaĝajn fratinojn. Samaĝulan grupeton por ludado formis la tri plej junaj gekuzoj.

Kaj ni vidu kiel komenciĝis la kvazaŭa matĉo:

UNUA RUNDO: Estis ankorau knabetoj en la unuaj lernojaroj, dum vizito en urbo, la kamparana kuzo estis invitita al posttagmeza festo ĉe amikinoj de la urbanaj gekuzoj. Tie kvin knabinoj preparis sin por iel surprizi knabetojn, kiuj atendis foliumante porinfanajn revuojn. Jen la surprizo: Knabinoj aperis sen

vestoj, nur kun subvestoj aranĝitaj kvazaŭ bankostumoj. Kaj tuj ili komencis danci kaj kanti ŝajne laŭ skeĉo de tiama fama filmo. La kamparana kuzo sentis sangan flui al lia vizaĝo kaj per revuo intencis kaŝi ruĝiĝon. La urba kuzo ridegis kaj poste daŭre ĝuis rakontante la aferon al parencoj kaj amikoj. Kio plej doloris al la kamparana koreto estis la tro ofte intermiksita mokkrioj de la urba kuzo: "Kampulo, vi ĉiam estos kampulo!" Vere dum tiamaj multaj jaroj abunde cirkulis ŝercoj kaj humuraj rakontoj emfazantaj pri la nekulturitaj karakteroj kaj nerafinitaj manieroj de kamparanoj ĉefe kompare kun urbanoj.

La kamparano sentis sin kiel venkiton en malamika batalkampoj.

DUA RUNDO: Post la Hispana Civila Milito (1936-1939) la urbanoj plej suferis pro manko de nutraĵoj. Kamparanaj familioj laŭeble helpis ilin. Dum unu el la vizitoj de tiu urba familio la kuzoj estis senditaj al ekstervilaĝa ĝardeno por rikolti fruktojn kaj legomojn por manĝi kaj donaci. La kamparano observis atenteme la reagojn de la urba kuzo, kaj, revenante al la hejmo, disradiis rakontante laŭtvoĉe al ĉiuj: "Ĉu vi scias? La urba sinjoreto neniel povas distingi legomojn de herbaĉoj. Nek nomojn nek uzojn li konas! Liaj

piedoj ofte falis sur la kulturatajn plantojn aŭ en ĵus akvumitajn sulkojn, pro kio li enkotiĝis ĝis maleoloj! Plurfoje li kriis timeme ne nur pro hundoj, sed eĉ pro sendanĝeraj insektoj!" Je la fino, konsiderante la rezulton egalan, li povis senti sin iom kompensita.

TRIA KAJ KVARA RUNDOJ: Sed, bedaŭrinde, la urba kuzo trovis multajn aliajn kialojn por ripetadi sian preferatan esprimon. Ekzemple, kiam la kamparano unuafoje sin duŝis en moderna instalaĵo kun krano por varma akvo. Poste li diris, ke li ne sukcesis ĝustigi la temperaturon: Akvo falis varmega aŭ malvarma. Kiam li jam estis junulo, foje li decidis viziti tute sola leteramikon. La stratoj de la kreskanta urbo tute rektaj kaj paralelaj kun aliaj perpendikularaj ege faciligas renkontiĝon kaj cirkuladon. Nur post malfrua reveno li devis konfesi, ke elirante el vizitita domo jam en vespera horo, li sekvis la kontraŭan direkton kaj post longa irado, anstataŭ trovi la konatan promenejon, subite troviĝis en tute ne konata kvartalo... Ĉi-okaze neniam mankis la kuza konsolo: "Kampulo, vi ĉiam estos kampulo!"

KVINA RUNDO KAJ FINO: La mondo indiferece turniĝis kaj ŝanĝiĝadis.

La kamparano, kiu militservis en la urbo, tien revenis por ekla  
(Daŭrigo sur p. 47)

# La mantrikita kotonŝtrumpeto

**T**IO okazis dum la germana militokupado.

Geedzoj vivis en urbo. La edzino ŝategis buteron, kiu estis preskaŭ netrovebla en la urbo. Tamen najbarino ĉiutage, senĝene, antaŭ la okuloj de la edzino, avide manĝis grasan buterpanon. Estis netolereble. “Kial mia edzo ne estas sufiĉe elturniĝema por trovi buteron?” pensis la urbanino. Finfine, tro-tedita, la edzino diris al la edzo: “Aŭskultu, ne plu estas eble resti tiel. Necesas ke vi alportu al mi buteron.”

La sekvantan dimanĉon la edzo bicikle promenis en la kamparo. La unuaj vizitoj estis vanaj. Ĉiuj kamparanoj respondis: “Ne estas butero por la urbanoj. Tuj foriru!” Tamen unu el ili diris

al la urbano: “Se vi alportos al mi paron da mantrikitaj kotonŝtrumpetoj, mi donos al vi unu kilogramon da butero.”

La viro rehejmiĝis. Lia edzino tuj diris al li: “Ĉu vi havas buteron?” “Ankoraŭ ne, sed mi havas proponon,” li rakontis al sia edzino tion, kion la kamparano diris al li. “Paron da mantrikitaj kotonŝtrumpetoj,” ripetis la edzino. “Kie trovi tion?” Subite ŝi ekpensis, ke en la subtegmento estas malnova mantrikita kotonkovrilo. Ŝi diris al sia edzo: “Ni tuj maltrikos tiun kovrilon kaj mi trikos ŝtrumpetojn.” Dirite, farite.

Je la fino de la semajno, unu ŝtrumpeto estis preta. La edzo prenis sian biciklon kaj rapide iris al la kamparano. Tiu ĉi, konsta-

tinte, ke estas nur unu ŝtrumpeto, donis 500 gramojn da butero kaj ripetis al li, ke ĉiufoje li donos unu kilogramon da butero por unu paro.

Ĉiusemajne aŭ ĉiudusemajne, laŭ la kvanto trikita, la viro de la urbo alportis al la kamparano ŝtrumpetojn por havi buteron.

La du viroj bone interkonatiĝis. Kelkfoje, eĉ la urbano restis por manĝi iom kun la kamparano. Sed ĉio havas finon, kaj la kovrilo estis elĉerpita. Restis nur unu ŝtrumpeto. La urbano alportis ĝin al la kamparano kaj informis lin, ke ne plu estas eble trovi ŝtrumpetojn.

“Ne gravas,” diris la kamparano.

Ili denove kune trinkis lastfoje kaj la urbano, iom pli multparolema ol kutime, demandis: “Kion vi faras kun tiuj ŝtrumpetoj? Ĉu vi vendas ilin?” “Ne. Tute ne. Delonge mia edzino deziras mantrikitan kotonkovrilon.” La urbano ridegis kaj diris: “Kial ni ne pli longe estus parolantaj? Tiuj ŝtrumpetoj, kiujn mi alportis, devenis el kovrilo, kiun ni havis en nia subtegmento.”

Ankoraŭfoje la du viroj kune trinkis bonan likvoron, kaj ridante, la kamparano diris al la urbano: “Ne ĝenu vin! Venu, kiam vi volas serĉi buteron.”

Esperantigita de **Blary Gustave** (Francio)



## Kunlaboro petata

La Hangzhou-a Komerca Kompanio “Esperanto-Maró” volas kunlabori kun ĉiuj E-organizoj kaj esperantistoj pri komerca traktado, varo-perado, poŝta aĉetado kaj interŝanĝo de varoj.

Adreso: Direktoro Qiu Xirong, Jiefang Lu 24, CN-310009 Hangzhou, Zhejiang, Ĉinio

Telefono:  
+86-571-7071705  
Telefakso:  
+86-571-7035995

# Mia aktivado, favore al la Kampanjo 2000



“Bonvenon en Vlčany!”

**L**AŬ la distanco, kiu apartigas min de aliaj Esperanto-parolantoj, mi ŝajnas esti “izolulino”, sed miaj elhejmiĝoj pro movadaj eventoj, same kiel la perskribaj agadoj, certigas mian ĉeeston en la sangocirkulado de Esperantio. Krome, pluraj eldonaĵoj alportas hejmen la novaĵojn, okazintaĵojn de la verda socio.

Inspirite de la KAMPANJO 2000 de UEA, respektive, de la Manifesto de Prago, mi ekagis. Post multobligado de la Manifesto kaj de ĝia konciza ekstrakto, kion mi faris pro tuja surloka klarigo, mi komencis mian rondiron ĉe la geamikoj, gekonatoj, apogita de la helpopreta, kunlaborema familia fono. Iom post iom mi kolektis 200 subskribojn, ne nur formale, sed dissemante ĉiupaŝe informojn post informoj, laŭnecese kaj laŭdezire pri Esperanto kaj ĝia vivosfero. Strategia punkto de mia “mikrokampanjo” estas la baza lernejo kun hungara instrulingvo (mia ekslaborejo), sed bonvole scivolemism kaj subskribis la liston kuracistinoj, komercistoj kaj aliaj kontaktitoj.

Pri la pli interesaj eventoj de la Esperanto-movado, pri miaj plej impresigaj travivaĵoj regule mi informadis mian urbestron, sekve, post la UK de Prago li tre afable akceptis miajn gastojn, du kunlaborantojn de EPĈ, donacis al ili simbolajn objektetojn, disponigis aŭtomobilon por ĉirkaŭrigardo.

La laŭtempa ordo devigas min

mencii nun, ke dum nia tradicia aŭtuna foiro, kiu koincidis kun la kutima Esperanta Ago-tago, pasintoktobre, ni distribuis (helpe de du asistantoj) hungar- kaj slovaklingvajn foliojn, elektitajn de la 40-lingva serio de TEJO: “Kio estas Esperanto?” post multobligado, certe. Vizitantoj de Usono kaj Svislando hejmenportis miajn inform-materialojn eĉ anglakaj germanlingvajn.

Amaso da vortoj preskaŭ blokas nun mian cerbon. Kiel sciigi pri ĝojiga evento, kulmino de mia poresperanta laborado, forpelante la ombron de fanfaronado? Ek, forte kuraĝe: la 15-an de majo estiĝis la unua ZEO en nia vilaĝo, unikaĵo tiaspeca eĉ en nia tuta lando. Ho! La almetitaj fotografaĵoj jam malkaŝis ĝian sekreton, sed komentarioj estas neeviteblaj, jen:

Antaŭ du jaroj, okaze de historia jubileo, la urbestro stariĝis saluttabulon al ĉiuj tri en- kaj elirpunktoj de la (baldaŭ urboranga) vilaĝo. Laŭ la simbolaj koloroj de la setlejo estis pentritaj kvin strioj sur la tabuloj. Inter la du supraj kaj du subaj zonoj, kie paradas bonveniga frazo en kvar lingvoj, t.e. la slovak (ŝtata lingvo), hungara (loka majoritata lingvo), germana kaj angla, restis neokupita la plej larĝa, meza, verdkolora zono. Vi ja divenis: dialogo kun la kompleza urbestro, pozitiva reago, “memorigo” eĉ ne multfoja... Nu, “Bonvenon en Vlčany!” (unu

tabulo ĝuste ĉe la enirejo de nia strateto) estis inaŭgurita per konversacio kun la pli grandaj gelnerejanoj, akompanataj de la lernejestrino. Multobligis ankaŭ la intereso de la du najbaraj belulinoj por Esperanto, kiuj ridegas sur la bildoj, sed mankas instruantoj. Sekvos la aranĝo, parkigo de la grundo ĉirkaŭ “nia” tabulo, ja ĝi lokiĝas en la centra punkto de du grandaj vilaĝoj (Vlčany kaj Neded, po 4 mil loĝantoj), ĝemeliĝintaj laŭpozicie.

Plene mi konkordas kun la alvoko de Renato Corsetti (ESPERANTO, marto/98 p. 46) kaj el inter la tri agoceloj proponitaj mi elektis la duan, akordigeblan al la agadvolo de kie ajn vivantaj esperantistoj. Mia “fiksa ideo” ja estas, ke la vojo al la ĝenerala disvastiĝo de Esperanto kondukas, precipe, tra la normala, lerneja lingvoinstruado, pli facile akirebla en favora, por-neŭtrallingva socia atmosfero, kiun ni ĉiuj, sinkonsiderantaj esperantistoj, povas evoluigi, ne estu (ĝi) ke “nur” sur nia propra vivotereno.

**Solidaraj civitanoj de Esperantio: Helpu demonstri ke la bonvolaj faroj de eksteruloj favore al nia afero eĉas tutmonde. Sendu kelkajn gratulvortojn (Esperante kaj vialingve) sur bildkartoj pri viaj urboj, vilaĝoj, al la sekva adreso: S-ro, JUDR. Jozef Cibula (urbestro), Vlčany, SK-925 84 Slovakio.** ■

**ĈINIO**

● La 30-an de majo 1998 Li Zhongmin, ĝenerala sekretario de la Zhejiang-a Esperanto-Asocio donacis infanajn Esperantajn legaĵojn al la Esperanta kurso de la Eksperimen-

1998 okazis en la dana urbo Aalborg jubilea 50-a Kongreso de Internacia Fervoja Esperantista Federacio (IFEFF), kiun partoprenis 263 samideanoj el 21 landoj. Dum kelkaj tagoj oni intense laboris kaj kunvenis,

po estis sur kontentiga nivelo. Tiu ĉi jare E-Ligo de Serba Respubliko, Universitata studenta centro kaj E-societo "La mondo" el Banja refonda kunveno estis organizita la 4-an de junio en studenta klubo kiu apartenas al Universitata studenta centro. Tiam estis elektita estraro de la klubo kaj prezentita plano por tiu ĉi jaro. Elektita prezidanto diris ke la ĉefa celo estos praktika uzado de internacia lingvo kaj interŝanĝi kun Esperantaj kluboj el eksterlando. La studentoj invitas Esperantajn societojn el la mondo interŝanĝi vizitojn, librojn kaj bildojn. (Mico Vrhovac)



Li Zhongmin (la dua de maldekstre) donacanta librojn al junaj esperantistoj

ta Elementa Lernejo de Shaoxing-gubernio nome de la asocio kaj gratulis la infanojn pro la festo. En 1-a de junio la kurso eksponis pli ol 100 leterojn kaj fotojn de Esperantaj asocioj kaj individuoj de pli ol 20 landoj. La infanoj salutis la vizitantojn en Esperanto. (Li Zhongmin)

● La 15-an de majo la Inform-industria Ministerio de Ĉinio (la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio antaŭe) emisiis serion de specialaj poŝtmarkoj "La Emblemo de la 22-a Kongreso de la Universala Poŝta Unuiĝo". La Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco tiutage uzis memorigan poŝtstampilon en Esperanto. La desegninto de la poŝtmarkoj estas s-ro Zhang Linrui.

**DANIO**

● En la tagoj 16.-22. 05.

elektis la novan estraron kaj ĉefkomitatanon. Krom diversaj raportoj kaj pritraktoj de la novaj fakterminoj oni povis aŭskulti la ĉefan kongresan prelegon de Henning Olsen en Danio kun temo "La firma konekso trans la Sundon" kaj dekon da aliaj malpli longaj fakprelegoj. La venonta 51-a Kongreso de IFEFF okazos en la tagoj 8-a ĝis 15-a de majo 1999 en Le Mans, Francio. (Jindrich Tomisek)

**JUGOSLAVIO**

● Antaŭ civitana milito en Bosnio ekzistis Esperanta klubo en Universitato de Banja Luko. La klubo estis konata en eksa Jugoslavio, ĉar ĝi sukcese organizis kelkajn studentajn renkontiĝojn. La internacia kunlaboro kun studentaj kluboj el Eŭro-

**SVISIO**

● La 29-an - 30-an de novembro Kultura Centro Esperantista festos la tridekan datrevenon de sia fondiĝo. Tio koincidos ankaŭ kun la kvindekjariĝo de la Akademio, refondita post la mondmilito, kaj kun la same ora jubileo de la Universala Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj. KCE invitis kelkajn el siaj plej kvalifikitaj prelegis-



Partoprenantoj de la 50-a Kongreso de IFEFF

toj, por pritrakti la evoluon de Esperanto 1968-1998, el pure lingva vidpunkto. Kontakta adreso: Kultura Centro Esperantista, Pf 311-Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. (Kultura Centro Esperantista)

# Fruktodona 83-a Universala Kongreso de Esperanto

Teksto de WANG LIHUA


Fotoj de LIU SIGONG

**L**A nomita kongreso kun partopreno de pli ol du mil samideanoj okazis inter la 1-a kaj 8-a de aŭgusto 1998 en Montpeliero, ĉarma universitata urbo en suda Francio, la lando, kiu gastigis la 1-an UK antaŭ 93 jaroj, kaj kies asocia E-movado estas centjara.

Dum la kongresa semajno okazis 19 artaj aranĝoj, 28 prelegoj, pli ol 90 laborkunvenoj kaj ekskursoj kun pli ol 3 500 homoj. La kongreso estis ne nur brile sukcesa, sed ankaŭ multtrilate fruktodona.

Unu el la plej menciindaj fruktoj de la kongreso estas, ke la Komitato de UEA elektis por 1998-2001 novan estraron de UEA kun s-ro Keppel Enderby (Aŭstralio) kiel prezidanto. La nova prezidanto promesis, ke la seskapa estraro intencas ege diligente labori por progresigi la komunajn celojn en Esperantujo. En la fermo, analizinte la ekzistantajn problemojn en nia Esperantujo kaj iliajn kialojn, li diris, ke nia tasko estas pruvi al la cetera mondo, ke Esperanto devas esti traktata serioze, ĝuste kaj juste. Por tio ĉiuj esperantistoj inkluzive lin, antaŭ ĉio devas konstante plibonigi siajn lingvajn kapablojn. Due, ĉiuj esperantistoj devas daŭrigi siajn in-

dividuajn kaj kolektivajn penojn antaŭenigi la bonfarcon de la landaj asocioj kaj UEA speciale,



**Nova UEA-prezidanto Keppel E. Enderby kaj antaŭa prezidanto Lee Chong-Yeong**

ĉar al ili la decidofarantoj de la mondo devos rigardi por decidi, ĉu Esperanto meritas seriozan atenton aŭ ne. Li kore petis, ke ĉiuj esperantistoj aliĝu al kaj aktiviĝu en siaj landaj kaj fakaj asocioj, membriĝu al UEA, aktiviĝu en la Kampanjo 2000 kaj intertempe ĝuu Esperanton.

Kiam K. Enderby en la fermo esprimis koregajn dankojn al la malnova estraro, precipe al eksprezidanto prof. Lee Chong-Yeong, pro iliaj bonegaj kaj fruktodonaĵoj laboroj, aŭdiĝis longedaŭra varma aplaŭdado. La dankojn ja meritas prof. Lee

Chong-Yeong kaj liaj kolegoj. Iliaj laboroj jam alportis la fruktojn, el kiuj plej elstaras la iniciativo de la Kampanjo 2000 kaj plifortigo de rilatoj inter UEA kaj UN kaj inter tiu kaj Unesko.

En la fermo oni akceptis la kongresan rezolucion, kiu alvokas al UN, ties instancoj kaj neregistaraj organizaĵoj, ke ili donu pli grandan atenton kaj serĉu eblan solvon de la problemo de la lingva dimensio en homaj rajtoj, alvokas al Unesko, ke kadre de ĝia Linguapax-programo ĝi konsideru instruadon

de Esperanto por eksperimenti ĝian valoron en la antaŭenigo de interkultura edukado, alvokas al la landaj kaj fakaj organizaĵoj intensigi siajn klopodojn por meti la internacian lingvon Esperanto kaj ĝiajn valorojn je la servo de la evoluo de la nuna mondo en paco kaj toleremo.

La kunsido de EPCĈ-legantoj dum UK jam iĝis tradicia ero. Posttagmeze de la 3-a de aŭgusto, antaŭ la kunsido jam svarmis samideanoj antaŭ la pordo de la salono Cart. Profitante de tiu tempo, itala samideano V. Madella, sin prezentis al mi, ke li estas kon-



stanta abonanto de EPĈ, kaj esprimis sian amon al la revuo, dirante: “Mi miras, per kia maniero vi ĉiam gardas vian revuon ne nur bela kaj interesa, sed ankaŭ akurata.” Iu maljuna franca esperantisto donis al mi siajn manuskriptojn. Lia filo diris al mi, ke lia patro estas multjara abonanto de EPĈ, kaj traduki artikolojn de EPĈ en la gepatran lingvon estas lia granda plezuro.

Kompare kun la pasintaj EPĈ-kunsidoj la ĉi-jara havis apartan eron — doni premiojn al la gajnintoj en la fotokonkurso. Fone de la podio pendis granda tabulo kun 24 allogaj fotoj faritaj de esperantistoj kaj publikigitaj sur la dorskovriloj de EPĈ de la januara ĝis decembra numeroj de 1997. S-ro Dai Song'en, vicĉefredaktoro de EPĈ, gvidis la kunsidon. Li antaŭ ĉio kore dankis la samideanojn, kiuj sendis fotojn al EPĈ por la rubriko “Fotoj Faritaj de E-istoj”, unu el la plej ŝatataj kaj bonvenaj rubrikoj. Post anonco de la gajnintoj, li donis premiojn kaj kore esperis, ke niaj legantoj daŭre helpos EPĈ per sendado de fotoj por la nomita rubriko.

Poste, s-ro Dai raportis pri la nuna situacio de EPĈ. Li diris, ke EPĈ alfrontas diversajn defiojn de la merkat-ekonomia sistemo, kiuj temas ĉefe pri la memstareco financa. En tia situacio aparte grava kaj kortuŝa estas la monhelpo de malavaraj samideanoj al la Fondaĵo EPĈ-abono, per kiu nepagipovaj esperantistoj en multaj landoj povas akurate ĝui EPĈ. Je la nomo de EPĈ-redakcio kaj la favoratoj, li kore dankis ĉiujn donacintojn. Dum la kunsido s-ro Heinz Schindler, nia amiko de multaj jaroj, donacis 1 000 germanajn markojn al la Fondaĵo. Poste, s-ro Dai sincere petis la ĉeestantojn prezenti proponojn kaj eĉ kritikojn pri la enhavo, lingvaĵo, bildoj, kovrilo kaj dorskovrilo de EPĈ, ĉar tio pli gravas kaj valoras ol laŭdoj.

La kunsido ĉeestis ĉ. 200



Ĉe la oficejo de Unuiĝo Franca por Esperanto

samideanoj, kaj pro la manko de seĝoj, multaj restis starantaj. La kunsidon filmis raportistoj de la Televida Stacio VPRO el Nederlando.

Tuj post la kunsido multaj samideanoj nin ĉirkaŭis por peti informojn, aboni la revuon kaj doni mondonacon al EPĈ-redakcio.

En la kunsido de “Libroj de la Jaro”, s-ro Dai, kiu funkcias ankaŭ kiel direktoro de la Ĉina E-Eldonejo, kaptis minuton por prezenti la nove eldonitajn librojn “Ilustritaj Gravaj Eventoj en la Vivo de Konfuceo” kun interesaj bildoj kaj en facila lingvo kaj “Alfluginta Monto” el ĉinaj popularaj rakontoj, taŭgaj ankaŭ por E-kursoj kaj komencantoj. Li montris ankaŭ “Ruĝdoma Songô” (Volumo III), “Fulmotondro” kaj “Sunleviĝo” aperigitajn fine de 1997.

Kiel aziano, mi tre atentis la azian movadon. Dum la kongreso okazis du aziaj kunsidoj. Antaŭtagmeze de la 6-a de aŭgusto pli ol 30 samideanoj el Azio kaj aliaj kontinentoj kunsidis en la salono Sébert. Oni aŭskultis raportojn pri la preparlaboroj de la 2-a Azia Kongreso de Esperanto okazonta en la venonta aŭgusto en Hanojo. Posttagmeze ĉ. 40

aziaj kaj neaziaj esperantistoj bone informiĝis pri la movado en diversaj aziaj landoj. Surbaze de la movado dum la pasintaj tri jaroj, s-ro Puramo Chong, nova prezidanto de Komisiono pri Azia E-Movado, anoncis la projektojn por azia movado: Kunlaboro de aliĝintaj landaj asocioj; sendi kompetentajn instruistojn al landoj, kie ne ekzistas movado aŭ kie estas bezonataj altnivelaj instruistoj pri Esperanto; kaj aligi aziajn aktivulojn al UEA.

Laste, sed ne malpli grave estas, ke dum ni atendis la revenan flugon en Parizo, ni vizitis la sidejon de Unuiĝo Franca por Esperanto, kiu estas peranto de EPĈ kaj ĉinaj E-libroj kaj varbis por ni la plej multajn abonantojn inter la eŭropaj perantoj. Tie ni havis tre agrablajn renkontiĝon kaj interparolojn kun s-ino Louise Marin kaj s-ro Schmidt le Roi. Nome de EPĈ, s-ro Dai esprimis al ili plej korajn dankojn kaj altan estimon pri ilia diligenta laboro, atenteme aŭskultis iliajn konsilojn kaj donacis al UFE tre delikatan porcelanan florvazon. S-ino Louise Marin promesis alporti rozojn el sia ĝardeno por meti en la florvazon. Mi esperas, ke la kunlaboro inter ni kaj UFE prosperos kiel ĉarmaj rozoj! ■



Fervora EPC-leganto (dekstre)




Post la kunsido de EPC-legantoj




Gaja renkontiĝo






Solena inaŭguro de la 83-a UK



Nova UEA-prezidanto Keppel E. Enderby (meze)



Ĉinaj kongresanoj



UEA-vicprezidanto Renato Corsetti (meze), prez. de la Akademio G. Mattos (maldekstre) kaj EPĈ-vicĉefredaktoro Dai Song'en

# lom pri filmoj

de XIANG HONG

*Junularo ĉiam estas la plej fidela spektantaro de filmo, kaj Xiang Hong estas unu el la gardantoj de estetiko. Ŝia artikolo vidigas, ke ŝi ne ŝatas la komercajn filmojn, kiuj invadis la nunan filman merkaton. Tiukaze ŝi fariĝis filmamanto ne vizitanta kinejon. Ŝajne inter filmoj komerca kaj arta neniam estas atingebla ekvilibro, tio rememorigis al mi la temon de la 81-a UK "Kulturo: ĉu valoro aŭ varo?". Certe, en la estanteco, kiam kulturo pli kaj pli var- iĝas, ni junuloj, kiel ĉefa konsisto de filma spektantaro, havas la devon fari penojn por teni la filmojn en la arta nivelo.*

YU TAO

**J**AM dek monatojn mi ne vizitis kinejon. Fakte mi estas centpocenta filmamanto.

Foje je duono post la 5-a dimanĉe mi ellitiĝis kaj veturis per aŭtobuso du horojn por spekti du hungarajn filmojn kun simultana traduko, kvankam ili estis ne tiel interesaj kiel mi imagis; nelonge post mia enoficiĝo, tutnokta filmospektado estis ofta semajnofina aranĝo de mi kaj mia amato, kaj spekti kvar filmojn en unu spiro sufiĉe kontentigis nin, kvankam duonon de la nokto ni estis en dormo.

Mi profunde kredis, ke mi havas fortan inklinon al filmo, kun longedaŭra arda amo.

Tamen ja estas fakto, ke mi ne vizitis kinejon dum dek monatoj. Mi rigardis en kinejo la lastajn du filmojn "La perdita mondo" reĝisoritan de Steven Spirberg kaj "Kontraktantaj du flankoj" reĝisoritan de ĉina reĝisoro Feng Xiaogang. Escepte ke la simulo de dinosaŭro per komputero estas pli versimila ol tiu ĉe "Dinosaŭra ĝardeno", "La perdita mondo" ne estas laŭdinda ĉu en priskribo pri roloj ĉu en intrigo. Kvankam Feng Xiaogang estas malpli fama ol Spirberg,

tamen li estas rigardata kiel majstro en Ĉinio. Sed forlasinte la kinejon, mi ne povis kaŝi mian malesperon: La filmo "Kontraktantaj du flankoj" rakontas, ke iuj homoj starigis la kompanion "Dolĉa Sonĝo" por helpi klientojn praktiki sian deziron. La filmo, kiel la unua novjar-festa komedio de Ĉinio, bedaŭrinde vidigis al la spektantoj nur troigan memnigrigon sed ne naturan humuron. Kvankam ĝi temas pri helpemo, tamen oni ne sentas sincerecon de la helpantoj pro senzorga filmludo de la aktoroj. Kompreneble mia malŝato tute ne povis malhelpi ĝian profiton. Poste mi informiĝis de ĵurnaloj, ke en la unua monato de sia projekcio (de la 24-a de decembro 1997 ĝis la 23-a de januaro 1998) la filmo enspezigis en Pekino 10 200 000 juanojn, kio estas rekordo en la pekina merkato. Sed mi insiste opinias, ke profito ne estas ununura kriterio por prijuĝi filmon. Fakte la profiton de "Kontraktantaj du flankoj" oni ŝuldas al sukcesaj komercaj artifiko: stela efiko — famaj reĝisoro kaj aktoroj; plaĉa komedia stilo — tio konvenas al la poramuza psikologio de spektantoj; saĝa aranĝo de projekcio — ĉe la jar-

ŝanĝiĝo, kio kontentigas la bezonon de homoj por pasigi feriojn, krome multaj entreprenoj kutime donacis filmobiletajn al siaj oficistoj kaj laboristoj en la novjara festo; torento da reklamoj — la elspezo de 200 000 juanoj por tio estas rekorda en la lando.

Antaŭ aŭ post tio la projekciitaj filmoj, kiaj "Paroli pacience" farita de Ĉinio, "Rapideco II" kaj "Vesperthomo kaj Robin" importitaj el Holivudo, montras, ke filmo, kiel vida arto, post sia 100-jara evoluo, jam fariĝis pli kaj pli "tujmanĝa", pli okulplaĉa tamen malpli pensiga — almenaŭ la ĉefaj filmoj reprezentataj de tiuj de Holivudo tiel impresas nin. Kaj en "Titanic", la akomodigemo de moderna filmo al la popola intereso atingis sian kulminon, kaj la 11 gravaj premioj de Oscar montras aprobon de la socio al tiu fluo. Tamen por "Titanic", nek la plej granda investo en historio nek la senprecedencaj sceno kaj efiko faritaj de la plej avangarda komputera truko povas ŝanĝi ĝian "tujmanĝecon", ĝi estas nur giganta mozaika plado kun bela formo. Tian manĝaĵon oni povas gustumi, tamen tro multe manĝi perdigas la apetiton. Tial, kiam la

## Funebre al s-ino Takeuti Tomiko



Japana samideano Takeuti Tomiko forpasis la 23-an de aŭgusto pro stomaka kancero. Kiam venis la malfeliĉa informo, ni sentis grandan malĝojon pro la perdo de unu el niaj plej intimaj amikinoj, kaj iuj eĉ ne povis sin

deteni de larmoj.

S-ino Takeuti Tomiko naskiĝis en 1934, esperantistino ekde 1955. Unu el la fondintoj de Esperanto-Societo de Takatuki en 1966 kaj, kiel ĝia direktoro, 32 jarojn flegadis la societeton, i.a. en la organizado de Esperanto-ekspozicio kadre de la Kultura Festivalo, oficiala aranĝo de la urbo Takatuki. Ŝi estis senlaca semanto de Esperanto kaj eĉ en sia lasta tempo en hospitalo konigis Esperanton

al kuracistoj kaj flegistinoj per aŭdigo de Esperanto-elsendo de Ĉina Radio Internacia.

Dum multfojaj vizitoj al Ĉinio, Universalaj Kongresoj kaj gravaj Esperantaj renkontiĝoj de Azio kaj Ĉinio, ŝi starigis profundan amikecon kun multaj ĉinaj samideanoj kaj kuraĝigis ilin en lernado kaj praktikado de la lingvo.

Aparte menciindas, ke kiel multjara leganto de “El Popola Ĉinio” kaj fidela aŭskultanto de la Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia, ŝi entuziasme iniciatis okazigi en landaj kaj regionaj kongresoj kunsidojn por legantoj de “El Popola Ĉinio” kaj aŭskultantoj de Ĉina Radio Internacia kaj devokonscie helpis varbi abonantojn kaj aŭskultantojn. Ĉio ĉi kun ŝia afabla kaj dolĉa rideto restos ĉiam en la koroj de ĉinaj samideanoj, kiuj dividas la malĝojon kun s-ro Takeuti Yosikazu, ŝia versence samidea edzo, kaj daŭrigos ŝian amatan verdan aferon.

Pacon al ŝia cindro!

**Redakcio de “El Popola Ĉinio”  
Esperanto-Sekcio de Ĉina Radio  
Internacia**

vizaĝo de Leonardo DiCaprio furoris tra la tuta mondo en unu nokto, kaj kiam la filmoserio “Krio” ekscitis la film-amantojn, mi preferas resti hejme por ĝui “Lumoj de urbo” de Charles Chaplin, aŭ “La rakonto de naskiĝo” de Robert De Niro, aŭ “La kruela suno” de Rusio, aŭ “Observo de trajno” de Britio.

La klasikaj filmoj brilas kiel juveloj, kiujn cizelis la geniaj reĝisoroj, scenaristoj kaj aktoroj. Nian respekton meritas la filmo-artistoj, kiuj sincere atentis la homan animon kaj penas fidele speguli la vivadon de homoj. Dank’ al ilia penado filmo povas trakti la plej profundan penson de homoj, tiel ke ĝi sin turnis de populara amuzaĵo al unu el la ĉefaj artoj, kiaj dramo kaj romano. Trapasante la movoplanan filman merkaton kaj la gajan homamason, mi scias, kie ni trovos ilin.

Ili estas: Malone Brando en “La lasta tango en Parizo” kaj “La Baptopatro”, Robert De Niro en “La indignanta bovo” kaj “Cervo-ĉasanto”, Meryl Streep en “Eksteren de Afriko” kaj “Elektito de Sofie”, Daniel Day-Lewis en “Mia maldekstra piedo” kaj “En la nomo de patro”... Enlistiĝeblas ankaŭ multaj aliaj nomoj. Ĉiam ili kortuŝis nin, tiel ke ni forgesis la fakton, ke ili ludis en la filmo. Ofte ili vekis patoson dormantan en nia koro. Ili levis la prezentadon al arta nivelo.

Ili estas ankaŭ la sukcesintaj kaj karakterhavaj reĝisoroj. Kiam filmo kiel la sepa arto pli kaj pli maturiĝas, iom post iom reĝisoro fariĝas verkinto de scenaro same kiel pentristo aŭ verkisto — verkinto de sia verko. Ni eĉ povas opini, ke la filma historio esence estas tiu de la ĉefaj filmo-artistoj en ilia epoko, kiaj

Charles Chaplin, Orson Wells, Federico Filini, Ingmar Bergman kaj Kurosawa Akira. Ilia laboro, kiel diris Bergman, estas “sur vasta ebenaĵo gravuri drakokapon, feinon, diablon kaj sanktulon kaj finfine starigi artan preĝejon”.

Krome, en la nuna Ĉinio, kun plezuro ni povas trovi kelkajn reĝisoro-artistojn, ekz., Zhang Yimou. Estas distingiĝaj ĉiuj liaj filmoj, kiaj “Ruĝa sorgo” kaj “Esti vivanta”. La de li reĝisorita kaj en septembro premierita “Turandot” montras liajn superajn imagipovon kaj kreivon; Chen Kaige, miaopinie, kapablas krei filmojn pli eminentajn ol liajn “La lasta adiaŭo” kaj “Amafero”, li samtempe estas bona verkisto; Xie Fei reĝisoris “Nigra ĉevalo”, kies beleco transpasis la landlimon... En ili ni vidas la aŭroron de la ĉinaj filmoj. ■


# Skulptaĵo el tajlitaj porcelanaj pecoj

Teksto kaj fotoj de HAN HONG


Skulptaĵo el tajlitaj porcelanaj pecoj estas popola artaĵo de Dongshan-gubernio, Fujian-provinco, sudorienta Ĉinio. Ĝi estas uzata ofte kiel ornamaĵo de la supro de templo, palaco, kiosko k.t.p.

Diversaj porcelanaj bovlo, telero, kruĉo, taso, kaj ankaŭ vitra botelo kaj konko povas esti materialoj de tia skulptaĵo. Oni unue artisme tajlas ilin je diversaj formoj. Kun tegoloj kiel skeleto, oni kungluas tiujn pecojn kaj formas el ili pejzaĝojn, homfigurojn, florojn kaj bestojn. La skulptaĵoj tridimensiaj, reliefaj kaj plataj havas altajn valorojn de arto kaj apreco.

## Batalo kun monstro




Du drakoj ludantaj  
kun globo



Homfiguroj el klasikaj  
romanoj

Homfiguroj en antikva vesto



Ornamo sur la  
supro de templo

Korteganoj

# La naŭa konkurso de EPĈ-legado

Same kiel en la lasta konkurso, ni faros 10 demandojn ĉi-foje. Bonvolu legi la koncernajn artikolojn de EPĈ kaj respondi la demandojn per viaj propraj vortoj klare kaj koncize.

Skribu n-rojn de la demandoj kaj viajn respondojn sur papero, kaj sendu ĝin antaŭ la 15-a de januaro 1999 al s-ro Wang Hanping, El Popola Ĉinio, P. O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio.

En 1999 ni okazigos la dekan konkurson de EPĈ-legado. Ni esperas, ke niaj tutmondaj legantoj partoprenos en ĝi. Pri la konkurso viaj proponoj kaj sugestoj estas bonvenaj.

La demandoj estas jene:

1. Wushan-gubernio situas ĉe la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero, kie troviĝis la fosilio de Wushan-homo. Kiom da jaroj la fosilio havas?

2. Kiu dialekto estas parolata en Aomen (Makao)? Kaj kiam Aomen revenos al Ĉinio?

3. Kio estas la diferenco inter ĉina dramo kaj ĉinaj tradiciaj teatraĵoj?

4. Ĉinio praktikas nacian aŭtonomecon. En kiu aŭtono-

ma regiono koncentre loĝas huj-oj?

5. Kiam fondiĝis Xia, la unua ĉina dinastio?

6. Kiuj estas la unuaj tri grandnombraj familiaj nomoj en Ĉinio?

7. Kiu tago estas la Instruista Tago de Ĉinio?

8. Kiuj artikoloj pri la ĉinmedicina sanprotekto sub la rubriko "Por via sano" de EPĈ estas utilaj por vi?

9. Kiuj animaloj estas pereontaj kaj serioze protektataj en Ĉinio?

10. Koncize diru, kion vi konas pri Ĉinio. Ĉu EPĈ helpas vian konadon pri Ĉinio?

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo:** Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭmallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% darabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de laanoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\* E-klubanoj (20-40-j.) dez. kor. kun amikoj aŭ e-istoj el Vjetnamio kaj aliaj landoj pri la vjetnama lingvo, privata amikeco, kulturo, vojaĝo, interŝanĝo de libroj kaj poŝt-

markoj ktp. Adr.: Hu Xiaochun, 609 Shi, 2 Hao, Dianchi Lu, Jianhua Qiye Jituan, CN-650034 Kunming, Yunnan, Ĉinio.

\* Liu Lingzhi, 17-j. lernantino en teknika lernejo, dez. kor. Esperante, angle aŭ ĉine kun lernantoj el la mondo pri lernado, la angla lingvo, Esperanto, komputero, muziko, filatelo, karikaturo, danco, glitkurado, naĝo, korbopilko, tablotenis kaj societa kontakto. Adr.: 4-601, Nan 3 Jie, Fei'e Xilu, CN-510405 Guangzhou,

Guangdong, Ĉinio.

\* Jovan Nesic, 74-j. dez. kor. kun ĉinaj ekonomiaj fakuloj. Adr.: Bulevar Lenjina 66/28, YU-18000 Nis, Jugoslavio.

\* S-ro Deywek Peter Opa dez. kor. tm. kaj reciprokas gastigadon. Adr.: P.O. Box 250, Badagry, Lagos State, Niĝerio.

\* S-ro Eddy Silva Molina dez. kor. tm., interesiĝas pri disvastigo de Esperanto. Adr.: Clinica Santa Maria - 3 cuadras al sur, B San Jose Oriental, Managua, Nikaragvo.



# “Lando de virinoj”

de HAN HONG



Mosuo-a virino

ESTIS jam la 10-a vespere, kiam mi atingis la urbeton Lugu. Obskura nokto vualis la tiean kvietan kaj misteran “landon de virinoj”. El ĉiu ligna domo elrigardis nebuleca lumo. De mallarĝaj vojoj aŭdiĝis malklara galopado, kio montris, ke mosuo-aj knaboj hastas al sia amatino por kuna tranoktado.

La tiel nomata lando de virinoj situas en profundaj montoj inter Sichuan kaj Yunnan de sudo-kcidenta Ĉinio. Tie ankoraŭ konserviĝas moroj de la matriarka socio. Oni vivas en granda familio kun virino kiel la ĉefo, pro tio la urbeto estas nomata ankaŭ “lando de virinoj”. Tie la viroj kaj virinoj ne geedziĝas, tamen havas seksrilatojn. Se ili enamiĝas unu al alia, ili do fariĝas *aŝja*-oj (signifantaj havi seksrilatojn en la loka lingvo). La knabo sekrete aŭ malkaŝe iras al la hejmo de sia amatino, tranoktas kune kun ŝi kaj foriras en la sekvanta mateno. Kvankam ili amas unu la alian profunde, ili ne povas fariĝi leĝaj geedzoj. Ilia infano estas flegata de sia patrino, onklo aŭ onklino kaj portas la familian nomon de sia patrino. La patrino estas la ĉefo de la familio, ĉar neniu familio havas patron. Ja estas moro, ke neniu paro da *aŝja*-oj havas ĵuron pri

amo nek vivas la tutan vivon kune. Kiam ilia amo malfortiĝas, ili do serĉas novan kunul(in)on. Oni diras, ke tiu stranga moro havas rilaton kun mita diino Gemu, bela, sentimentala kaj amorveka. Ŝi havis plurajn *aŝja*-ojn, diojn de la ĉirkaŭaj montoj ĉe Lugu-lago. Oni diras ankaŭ, ke antaŭe la regantoj difinis, ke oni devas pagi imposton por geedziĝo, sed la malriĉaj mosuo-oj ne havis monon por tio, tiel ke ili devigite observis la antikvan moron.

En la sekva frumateno mi ellitiĝis kaj eldomiĝis portante la fotilon. Mi avida spiris la freŝan aeron, rigardante la lazuran ĉielon, blankajn nubojn kaj klaran lagon, kaj mi sentis min kvazaŭ en kristala mondo.

Proksime de mi, iu virino kaj ŝiaj filinoj kune kultis montan dion. Tion ili faras ĉiumatene. La altaro estis malgranda termaso. La patrino bruligis pinan branĉon kaj metis ĝin sur la altaro, dume ŝiaj filinoj surgenuje preĝis en la lingvo ne konata de mi kaj post tio ili iris ĉirkaŭ la monteto sekvante la patrino. Oni diris al mi, ke ĉiu ĉirkaŭiro signifas unufojan reciton de sutro, ĉar sur la rokoj ekster la altaro estas gravuritaj sutraj tekstoj. Mi demandis mian ĉiĉeronon, ĉu ili estas en la mosuo-a lingvo. Li neis. Antaŭe

oni opiniis, ke la mosuoj ne havas skriblingvon, sed poste iu erudiciulo trovis du almanakojn cirkulantajn inter la popolanoj. La libroj estis skribitaj per 32 desegnoj pri feliĉaj kaj malfeliĉaj tagoj en la 12 monatoj de la jaro. El ili la signoj montrantaj grandan feliĉon plejparte markas la virinan sekson aŭ rilatas al la seksumado de la geviroj. Tie la ina sekso estas respektata, tial Lugu-lago estas nomata ankaŭ virina lago kaj Gemu-monto — patrino, kaj la herooj en iliaj prahistoriaj legendoj senescepte estas ineksaj...

Je la momento aperis ĉielarko super la lago, kiu interligis la du bordojn. La alia bordo apartenas al Yunnan-provinco. Sub la ĉielarko kelke da mosuo-aj virinoj eniris en sian propran pirogon tenante ŝpaton, kune kun siaj infanoj. Mi salutis ilin kaj demandis, kien ili iras. Ili kun rideto respondis al mi en Sichuan-a akcento: “Ni akompanas la infanojn al lernejo trans la lago. Tie estas ankaŭ niaj kampoj de maizo, rizo kaj terpomoj.” La mosuo-oj nun ankoraŭ vivas laŭ la kutimo ripozi de la sunsubiro kaj labori de la sunleviĝo. Ĉiutage per boato ili iras terkulturi aŭ fiŝi kaj ĉe la vesperiĝo rendevuas sian amatino. Eble la pirogo estas sola ve-

turilo por ilia irado al la ekstera mondo.

La aŭtarcia vivo igis la mosuo-ajn virinojn tre kapablaj. Ili faras ĉion bezonatan por la ĉiutaga vivo. La ruĝa jako kaj blanka jupo estas faritaj de ili mem. Ankaŭ la dolĉa rizvino. Ili mem kaptas fiŝojn en la lago kaj bakas la tranĉitajn fiŝojn ĉe la fajro. Por kuracado ili iras kolekti drogojn en monto. En ilia kuracado salo lu-

das gravan rolon. Kiam virinoj suferas ventrodoloron, ili metas bakitan salon en tolsakon kaj fomentas per ĝi la doloran korpoparton. Post ekskurso ili banas siajn piedojn en salakvo... Ankaŭ la de ili uzata salo estas preparita de ili mem. Antaŭ 2 000 jaroj iu mosuo-a virino trovis, ke la de ŝi paŝtataj ŝafoj ĉiam direktas sin al unu sama fonto, neglektante la aliajn. Ŝi miriĝis, gus-

tumis akvon el la fonto kaj trovis, ke ĝi estas sala. Ŝi konigis la sekreton al aliaj kaj per tio multe riĉigis sian tribon. La posteuloj honoris ŝin prapatrino de la monto kaj tiu ĉi fonto ricevis la nomon sala fonto. En la 8-a — 9-a jc. dek miloj da mosuo-oj transloĝiĝis en Kunming de Yunnan 1 000 km fore. Ili do fiksloĝis tie, instruis teknikon fosi salputon, muldi poton kaj fari salon.



Sur Lugu-lago

Ronde dancantaj





Teksado



Por sin sanigi mosuo-oj ofte banas sin kelke da tagoj en termofonto norde de Lugu-lago. Tie la viroj kaj virinoj nudaj banas sin kune, tute senĝene. Tiam la gejunuloj kantas amkantojn por serĉi sian *aŝja*-on.

Vespere, kiam malrapide levigis la hela luno, oni invitis min al medikamenta banado, kompreneble, tie la viroj kaj virinoj sin banas tute aparte. ■



Mosuo-aj knabinoj

Mosuo-aj geamantoj



Kulto al monto



# Mongola kuracistino Wu Lan



Wu Lan dum kuracado

**F**RU MATENE en frosto kuracistino Wu Lan hastis al la hospitalo. Sed en la konsultejo estis neniu. Ŝi longe atendis, tamen ankoraŭ neniu venis. Tio surprizis ŝin: ordinare en tia tempo suferantoj jam atendis en longa vico. Multaj eĉ venis el malproksimaj lokoj. Oni esperis ke la kuracistino kreas miraklon per la originala mongola kuracarto. Sed kio okazis hodiaŭ? Telefono sur la tablo sonis, kaj aŭdiĝis la voĉo de iu suferanto: "Wu Lan, vi estas tre laca, hodiaŭ ni ne venos viziti vin, bonan feston!" La suferantoj sciis, ke ŝi estas tro okupata kaj ne havas tempon por ripozi, do ili "strikis". Sidante sola en la konsultejo, Wu Lan multe pensis...

Antaŭ la fondiĝo de sia ĥanejo en la 13-a jc, la mongoloj jam havis proprajn medikamentojn kaj terapiojn, inkl. 5 terapiojn: akupunkturo, mokso, sango-ellaso, kupado kaj medikamenta bano. Kompare kun internaj kuracadoj, tiuj eksteraj kuracadoj taŭgas por pli multe da malsanoj, ili estas efikaj kun malmultaj flankefikoj, ankaŭ malmultekostaj kaj facile aplikeblaj. Bedaŭrinde la antikvaj mongoloj ne detale notis tiujn terapiojn. Kvankam en la Medicina Instituto de Interna Mongolio estas lernobjekto de la 5 mongolaj terapioj, tamen ĝis fine de la 80-aj jaroj, en la Aŭtonoma

Regiono de Interna Mongolio ne estis sistema kaj regula kuracejo de la 5 terapioj. En 1986 Wu Lan diplomiĝis de la instituto kaj eklaboris en Zhongmeng-Hospitalo. Ŝi petis estrojn de la hospitalo, ke ili starigu sekcion de la 5 mongolaj terapioj. La estroj konsentis kaj disponigis al ŝi dometon kun asistanto.

Komence preskaŭ neniu vizitis ŝin, hazarde suferantoj eniris en la kuracejon, kaj vidinte ŝin juna, ili foriris.

Wu Lan ne perdis memfidon, ŝi modeste lernis de maljunaj mongolaj kuracistoj kaj diligente praktikis bazajn kuracartojn. Akupunkturo kaj mokso estas plej popularaj eksteraj terapioj. Ilia efiko ne nur rilatas al diagnozo, sed ankaŭ al metodoj. Por ĝuste akupunkturisti, ŝi faris provadon sur sia korpo. Pro tio ŝiaj brakoj kaj gamboj suferis ne nur de doloroj sed ankaŭ de kongesto. Tamen ŝi ne cedis. Ŝi provis ĉiujn siajn akupunkturajn punktojn, kiujn ŝi povis atingi per sia mano. Pro la neatingeblaj punktoj ŝiaj patro kaj edzo fariĝis celo de eksperimento. Kiam ŝi fariĝis sperta, ŝi kaj ŝiaj kolegoj ekakupunkturis malsanulojn. Post du periodoj de kuracado 5-6 malsanuloj resaniĝis. Post tio ŝi pli kaj pli famiĝis inter pacientoj.

"Kuracistino Wu savis min

de morto," la 54-jara mongola maljunulo Guan Qige diris. "Antaŭe mi suferis de encefal-atrofio, hepata cirozo, kontrakturo, aŭda kaj vida halucinoj kaj nereteneblo de fekado kaj urinado. Specialisto diris, ke mi mortos baldaŭ. Mia edzino aŭdis, ke kuracistino Wu bone kuracas, kaj ordonis ke la filo dorse portu min al Zhongmeng-Hospitalo. Post mokso, pogutigado kaj masaĝo, mi rehavis sentojn en la sekvanta tago. Post iom pli ol 20 tagoj mi povis iri."

La sekcio de la 5 terapioj gvidata de Wu Lan jam fariĝis la plej granda por ekstera kuracado en Interna Mongolio. Ĉiujare ĉ. cent lernantoj kaj kuracistoj de la lando venis tien por studi. La Monda San-Organizo sendis tien lernantojn el Mongolio kaj Singapuro por lerni la 5 terapiojn. Dum kuracado Wu Lan esploris metodojn por kuraci lumbalgion, kaj 97% da kuracitoj resaniĝis.

Same kiel multaj aliaj sukcesintaj ĉinaj virinoj, Wu Lan renkontis multe da malfaciloj. Ekz. ŝi povas kuraci malsanulojn en ajna tempo, tamen ne povas akurate akompani hejmen la filon, kiu atendas ŝin en infanĝardeno. Hodiaŭ la suferantoj ne vizitas ŝin, ŝi do decidis kune kun la filo viziti amuzejon, kion li longe deziras. ■

# Kolororiĉaj vestoj de mongoloj

Fotoj de EBO kaj HUANG LUKUI



Ĉinaj mongoloj loĝas ĉefe en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio en norda Ĉinio. Ili vivtenas sin per paŝtado. De centoj da jaroj iliaj vestoj estas famaj pro siaj specialaj fasonoj kaj delikata kudro. La vestoj de mongoloj okulfrapas per la kontrasto de koloroj kaj efektoj. Ĝenerale, la mongoloj portas longan robon kun manikoj longaj kaj larĝaj, kaj kolumo alta. La vira robo estas blua, malhelkolora, dum la virina estas strikta, pimpa, helkolora kun felaj ornamaĵoj aŭ koluma kaj manika borderoj el brodita silkaĵo, sube ne estas fendoj. Kiam la viroj faras zonadon, ili ofte iom supren tiras la robon por faciligi la rajdadon, dum virinoj tiras ĝin iom malsupren por montri sian sveltecon. Ili ŝatas zonon el ruĝa aŭ verda silkaĵo.

Estas belaj iliaj kapornamaĵoj el agato, koralo, jado aŭ arĝento. Mongoloj havas botojn ledajn, feltajn aŭ tolajn kun delikataj desegnoj. Sur la luktejo, viroj portas vestojn kun desegno de drakoj kaj feniksoj, kiuj


simbolas feliĉon.

Tiuj vestoj montras la tradicion kulturon de la mongola nacio kun longa historio. Eĉ en la nuna tempo ili distingiĝas inter la mondaj kostumoj per sia originala ĉarmo.



Arĝentaj ornamaĵoj sur la vesto de luktisto

Foto de EBO



Viroj en tiktistaj vestoj


Foto de HU



Mongol-naciaj virinoj

Foto de EBO

Ĉapo kun brodaĵo  
por juna viro Foto  
de HUANG LUKUI



Antaŭ jurto

Foto de HAN HONG

# Ŝi elektis pli taŭgan preventmetodon



Ekspozicio pri naskolimigo

**L**UO Shuxia estas ordinara kamparanino en Hebei-provinco, norda Ĉinio. Kiam ŝi konsentis provi novan preventilon en 1992, ŝi neniel konsciis, ke ŝi jam fariĝis antaŭiranto de praktikado de nova metodo de naskolimigo en la ĉina kamparo. Ekde tiam du novaj preventiloj, t.e. subderma enplanta preventilo kaj enutera kupra preventilo, aplikiga en la ĉina kamparo.

Luo estas tiu kamparanino, kiu la unua akceptis subderman enplantan preventilon. Tiam ŝi jam naskis du filinojn kaj post tio, kvankam ŝi uzis enuteran preventan ringon, tamen ŝi gravediĝis dufoje. Pro tio ŝi rifuzis enuteran preventan ringon, kaj plie, ŝia sanstato ne permesis al ŝi ovoiduktan ligaturon.

“Mi ne estas tiu, kiu ĉiam kuraĝe provas novajn objektojn. Mi perdis la fidon pri la preventiloj, kiuj facile kondukas al malsukceso. Mi estas ĝoja havi pli da rimedoj por elekti,” diris Luo. Ŝi ŝajne estis tre kontenta pri la operacio sur sia maldekstra brako. Ŝi decidis tion post plurfoja korpo-ekzamenado kaj kuna diagnozo de kuracistoj.

De tiam forpasis 6 jaroj kaj poste Luo neniam gravediĝis. “Mia edzo kaj mi ne plu ĉagreniĝas pro malsukceso de preventado kaj ni povas plenenergie mastrumi nian restoracion,” ŝi diris ĝoje. Ŝi finfine trovis

fidindan preventilon.

“Pli da elektoj por la ĉinaj kamparaninoj” estas nova projekto praktikata de la Ministerio de Publika Sano de la Ĉina Popola Respubliko en 1992-1997. La projekto estis aplikita al 75 000 naskipovaj virinoj en 16 vilaĝoj de Hebei- kaj Shandong-provincoj. Tie 20 000 virinoj elektis unu el la du supre menciitaj metodoj.

“La projekto ne kontraŭas al la aliaj utilaj metodoj aplikitaj antaŭe. Ĝi signifas doni pli da elektoj kaj helpoj al la virinoj,” diris s-ro Tu Bing, respondeculo de la projekto. “Komence de la 90-aj jaroj oni atentis nur limigon de naskokvanto, sed nun ankaŭ la sanon de la virinoj kaj donas al la kamparaj virinoj pli da efikaj preventiloj.”

Pro tio la Ĉina Naskolimiga Komisiono organizis demografiojn, specialistojn pri naskolimigo kaj kuracistojn en ellaborado kaj plenumo de tiu projekto. Ankaŭ la diverslokaj registaroj asignis monon por aĉeti necesajn kuracilojn kaj ekipaĵojn.

Komence de praktikado de tiu projekto oni faris enketon al virinoj en duonjaro por scii, kiujn preventilojn ili uzis kaj en kiuj cirkonstancoj la preventiloj malsukcesis. En la enketo oni trovis, ke la preventiloj ĝenerale uzataj de ĉinaj kamparaninoj, t.e. enutera preventa ringo kaj ovoidukta ligaturo, havas ĉiu sian malavan-

taĝon. La ringo ofte kondukas al malsukceso, ĉar ĝiaj modelo kaj materialoj ne taŭgas al ĉiuj, dum la ligaturo estas sekura, tamen maltrankviliga por la aplikantoj. Ĝenerale, la kamparaninoj ne scias, kiu preventilo taŭgas al ili, kaj ili hontas paroli pri tio. Sekve ili elektas preventilon ofte pasive. Por ke la kamparaninoj laŭvole elektu preventilon, specialistoj popularigas inter ili la sciojn pri preventado, disdonas al ili kernajn legaĵojn kaj okazigas TV-kursojn kaj kunsidojn.

Rezulte de tio la virinoj havis pli da kono pri diversaj preventiloj. Multaj el ili scias la malavantaĝon de steriligo kaj forlasis ĝin. En la pasintaj kvin jaroj nur 2 000 virinoj akceptis ovoiduktan ligaturon, sed sole en la jaro 1991 oni faris tiun operacion al 3 297 virinoj.

La projekto ne nur donis al la kamparaninoj rajton de elekto, sed ankaŭ akcelis la disvolviĝon de la ĉina naskolimigo. Laŭ statistiko, en la eksperimenta regiono la procentaĵo de abortigoj malleviĝis de 3.6% en 1992 al 0.34% en 1996. Kaj la naskokvanto (nasko fare de ĉiu milo da virinoj en unu jaro) malleviĝis de 57.7 en 1992 al 48.2 en 1996. Oni atribuas la sukceson al la bona servado, efika preventado kaj libera elekto. Dank’ al pliigo de efikaj preventiloj certe disvastiĝos tra la tuta lando la libera elekto far kamparaninoj. ■



## Virina mezlernejo en aŭtonoma regiono

**A**NTAŬE pro ekonomia postiĝinteco en la sudaj montregionoj de la Ningxia-a Hujnacia Aŭtonoma Regiono al la loĝantoj mankis eĉ fundamentaj kondiĉoj de la ĉiutaga vivo kaj sub la katenado de la malnova koncepto, ke la viroj estas honoraj kaj la virinoj humilaj, estis tre malfacile por la virinoj akiri la ŝancon esti klerigitaj. S-ro Hong Weizong, gvidanto de Hufuye-sekto de islamismo en Ningxia, bone scias, ke en la okuloj de Alaho ĉiuj homoj estas egalrajtaj kaj ankaŭ la knabinoj havas la rajton havigi al si sciojn. Tiu koncepto fariĝis pli kaj pli forta en lia cerbo kaj fine li iniciatis virinan mezlernejon, kontribuis per mono por ĝia establiĝo kaj donis al la lernejo la nomon de sia avo, kiu iam funkciigis elementan virinan lernejon. Jen fondiĝis la Virina Mezlernejo Hairu.

### ANKAŬ MI VOLAS LERNI

La mezlernejo situas en la gubernia urbo Tongxin, en la meza parto de Ningxia. Tie 80% de la loĝantoj estas huj-oj. En Tongxin troviĝas pli ol 200 moskeoj grandaj kaj malgrandaj. La loĝantoj plejparte kredas je islamismo.

En la lernejo estas pli ol 400 lernantoj, kies 80% estas huj-oj. Ili plejparte loĝas en la lernejo kaj lernas en pli ol 10 unuetaĝaj domoj. Antaŭ la domoj estas kabineto de la instruistoj, kiu servas ankaŭ kiel kunvenejo. Por konstrui ĝin s-ro Hong oferis materialojn al la lernejo.

La lernantoj plejparte venis el malriĉaj vilaĝoj de suda Ningxia. Fininte lernadon en elementa lernejo, post ekzameno ili venis ĉi tien por daŭrigi la lernadon. Multaj el ili piediris ĉi tien, portante grenon por duonjaro. La lernejo kaj registaro respondecas pri granda parto de la pago por ilia lernado kaj iliaj gepatroj elspezas nur por ilia ĉiutaga vivo.

Nelonge post la fondiĝo de la mezlernejo en la gubernio estis opinio, ke oni devas asigni la monon al alia laboro, sed ne al virina mezlernejo, ĉar lernado de la knabinoj ne estas la plej grava afero. Post kelkaj jaroj, kiam la knabinoj finis sian stu-



Kurso de tajlorado

don, iuj el ili eniris en novajn lernejojn kaj aliaj eklaboris, kaj la opinio estis ŝanĝita. Eĉ la gepatroj, kiuj vivas en la malproksimaj montregionoj, ekkomprenis, ke ili preferas vivi ŝpareme por ke la filinoj daŭrigu la lernadon.

Rimarkinte la grandan ŝanĝiĝon de siaj pli-aĝaj fratinoj, kiuj finis sian studon en Hairu-mezlernejo, la junaj knabinoj, kiuj en la juna aĝo komencis fari hejmajn laborojn, vidis sian esperplenan estontecon kaj petis siajn gepatrojn: "Ankaŭ mi volas lerni. Ankaŭ mi volas viziti la lernejon."

### LEVIĜIS NOVA ESPERO

La malriĉaj lernantoj bone scias, kion signifas por ili la lernado. Ili diligente lernas por kompensi la perditan. En la klasĉambroj ili atenteme aŭskultas al la instruistoj. Sur iliaj naivaj vizaĝoj legeblas firmeco. Instruistino Han Hui diris: "La plej grava eble ne estas lernado mem, sed firma volo en la vivo."

Ja estas laŭdinda la diligenteco de la knabinoj, des pli iliaj malkaŝemo kaj praktikemo. Ne ĉiu el ili povas daŭrigi sian studon post diplomiĝo el tiu ĉi lernejo kaj pro tio iuj el ili devas reveni sian hejmlokon aŭ eklabori.

Por solvi tiun ĉi problemon la lernejo establis du kursojn: plektan kaj tajloran. En postlecionaj horoj la knabinoj povas elekti unu el ili tute laŭ sia plaĉo. Sciante, ke ili ne povas daŭrigi studon post diplomiĝo, ili do kun ĝojo ekstudas en unu el la du kursoj por posedi teknikon. Ili scias, ke eble en la estonteco la scioj de fiziko kaj kemio, lernitaj de ili en la tri jaroj, ne estos utiligitaj portempe, tamen tiu tekniko multe helpas ilin en la estonta vivo kaj surbaze de tio ili povas posedi pli da scioj.

Baldaŭ finiĝos la konstruado de alia domo de la lernejo. En la estonteco pli da knabinoj venos ĉi tien el montregionoj por studi. Kvankam iliaj vestoj estas ne tiel belaj ol tiuj de urbaj knabinoj kaj la instrua nivelo estas ne tiel alta kiel tiu en grandaj urboj, tamen ĉiuj, kiuj lernis ĉi tie, neniam forgesos sian unuan esperon al la nova vivo, ĉar la espero leviĝis ĝuste ĉi tie. ■



Diskuto pri tekniko kun alilandaj knaboj



“Mi estas komencanto.”

“Malsukceso ne timigas min!”





Kiel juna aglo etendanta la flugilojn

# Flankenglitado de kuraĝuloj

Teksto kaj fotoj de KANG TAISEN



“Braval!”

Meze de la 19-a jarcento, la unua tobogano estis inventita, poste aperis novaj sportoj, kiaj flankenglitado, tobogano kaj akrobata biciklado. Ili tre interesas homojn per sia rigoreco.

En Ĉinio tre malfrue komenciĝis tiaj sportoj kaj nur iuj junuloj en urboj ŝatas sin ekzerci per ili. Por disvolvi tiujn sportojn, Lisheng-sportokompanio ĉe Wangfujing-strato de Pekino investis por konstrui U-forman terenon kaj terason por flankenglitado, kie amantoj de flankenglitado, tobogano kaj akrobata biciklado povas senpage sin ekzerci.

Tiuj amantoj aĝas 10-25 jarojn. Ilia lerteco ne estas granda, tamen ilian kuraĝon spektantoj laŭdadas.

Laŭ statistiko, la nombro de flankenglitaj amantoj en Pekino proksimiĝis al 80 000. La flankenglitado iom post iom disvolviĝas en la lando.

# Salo kaj la ĉina historio

de HAN XIUMEI

**E**BLE en la mondo troviĝas neniuj, kiu rifuzas salon en manĝado. Sen salo eĉ luksa plado fariĝas sengusta. Jen pro kio antikvaj ĉinoj opiniis, ke salo estas la plej grava el ĉiuj spicoj. Oni restas sana, se oni estas for de la spicoj dolĉa, acida, amara kaj akra, tamen, se oni detenas sin de salo nur dek tagojn, oni do fariĝas malforta. Ĝuste pro tio antikvaj ĉinoj diris, ke salo estas origino de la homaj vivo kaj ener-

gioj.

Ĉinaj kaj alilandaj sociologoj konstatis, ke en la pratempo la homoj emis loĝi ne nur ĉe fonto de akvo sed ankaŭ ĉe tiu de salo. Salo, samkiel akvo, funkcias kiel magneta kampo por la homa vivo kaj ludis gravan rolon en formiĝo de primitivaj triboj, kompreneble, por salo ankaŭ okazis batalo inter ili.

## ORIGINO DE LA ĈINA CIVILIZACIO

La baseno de la Flava Rivero estas lulilo de la ĉina nacio kaj en suda Shanxi-provinco, kie kuniĝas la meza kaj malsupra partoj de la Flava Rivero, estis sala lago kun perimetro de 60 km, kiun oni nomis Salproduktejo Oriente de la Flava Rivero. Proksime de la lago oni malkovris restaĵojn kun historio de 1.8 milionoj da jaroj, 600 mil jaroj kaj 5000-3000 jaroj respektive. La besta osto bruligita


antaŭ 1.8 milionoj da jaroj estas plej frua atesto pri fajrouzado de la homoj.

Huangdi estas rigardata kiel prapatro de la ĉina nacio. Li estis tribestro en la lasta periodo de la primitiva socio. Legendo diras, ke li gvidis akran batalon kontraŭ la suda tribo gvidata de Chiyou. Fine Chiyou estis senkapigita kaj lia sango transformiĝis en salakvon de la lago. Hodiaŭ sude de la lago ankoraŭ estas vilaĝo kun la nomo Chiyou. La unuan de la kvara monato ĉiujare laŭ ĉina lun-kalendaro ĉiuj vilaĝanoj pendigas soforajn frondojn sur sia pordo, dum membroj de aliaj vilaĝoj pendigas gliĉiajn frondojn antaŭ sia domo. La kutimo devenis de antikva legendo: Post morto de Chiyou fantomoj tumultis ĉe la lago kaj estis mortigitaj de iu generalo. Tiam la soldatoj de Chiyou estis kovritaj per soforaj frondoj, dum iliaj rivaloj per la gliĉiaj.

Arkeologoj multe interesiĝas pri la kaŭzo de la batalo. Jam de antikve en suda Ĉinio estas varmete kaj abundas pluvo. Tie la tero estas fekunda, riveroj multaj, arboj kaj herboj prosperaj, kaj la naturaj fontoj de manĝaĵoj multe pli abundaj ol tiuj ĉe la supre menciita lago, sed kial Chiyou avidis la mezan kaj malsupran basenojn de la Flava Rivero? Pluraj erudiciuloj konjektis, ke li sin trudis norden por rabi salon. Tio kompreneble indignigis



La Zigong-a Muzeo de Salprodukta Historio



Ĉerpi salakvon el puto per aparato movata de bovo

ĉiujn tribojn ĉirkaŭ la sala lago. Ili do kune batalis kontraŭ Chiyou, elektinte Huangdi, kiu rajtis disponi je la lago, kiel estron de la alianca armeo. Ankaŭ la posteuloj de Huangdi, nome, Yao, Shun kaj Yu, starigis sian ĉefurbon en loko distanca de la sala lago je 20-140 km.

## SALFARADO

En antikvaj libroj legiĝas multaj tekstoj pri specoj de salo: nigra, blanka, kristala, ruĝa kaj verda. Salo kaŝas sin en lago, maro, fonto, puto kaj roko, kaj en la nacimalplimultaj lokoj nord-okcidente de Ĉinio, salo sin trovas eĉ sur arboj kaj herboj. Niaj antikvuloj, profitante de la lokaj kondiĉoj, inventis teknikon de salfarado.

Salfaristoj ĉe la lago faris multajn cisternojn kaj kondukis tien salakvon el la lago kaj post sunumado akiris salon. La vento de sudo tre favoris salfaradon. Kiam forte blovis vento de sudo, post nokto salo estis pretigita en la tuta cisterno. Se la vento blovis de oriento, nordo kaj okcidento, do la pretigita salo estis

amara, kun koloro malplaĉa, kaj ne estis manĝebla, tian salon oni forskrapis kaj forĵetis. Estas strange, ke por fari salon oni ofte verŝas dolĉan akvon en la cisternon. Se falis pluvo antaŭvespere de la pretiĝo, do la salo estis bonkvalita — la saleroj estis kristalaj. Lertaj salfaristoj estis kapablaj antaŭscii la veteron.

En okcidenta Ĉinio estas multe da sallagoj kaj en la orienta parto de Ĉinio abundas mara salo. Historia verko notas, ke en la periodo de Huangdi estis Susha, kiu kapablis fari salon el marakvo per kuirado. La antikva ĉina ideogramo kun la signifo de salo tre similas al la homo, kiu kuiras salakvon por akiri salon. Ĉe maro salfaristoj sciis multajn metodojn por akiri densan salakvon. Post fluso oni forskrapis multe da salaj krustoj ĉe maro, ripetfoje lavis ilin en marakvo kaj tiamaniere akiris salon. Oni disŝutis cindron de tritika aŭ riza pajlo aŭ fragmito sur plaĝon, piedbatis ĝin kaj en la sekvinta mateno, post kiam leviĝis nebulo, aperis salo, kaj kiam ardis la suno en la tagmezo, oni kolektis

salon kaj cindron kune kaj kuiris ilin por akiri salon. Oni ankaŭ fosis profundan kavon ĉe maro, tegis ĝin per tabuloj, bambuoj, fragmitaj matoj kaj subtila sablo. Post fluso oni forprenis la kovraĵojn kaj prilumis la akvon per lampo. Kiam la salakva vaporo estingis la lampon, oni do ĉerpis la akvon por fari salon. Oni kuiris la salakvon en poto metala, bambua aŭ argila. Poste por ŝpari brullignon, oni do rekte sunumis salakvon.

En Sichuan kaj Yunnan de sudokcidenta Ĉinio, malproksime de maro, salo sin kaŝas profunde sub la tero. Jam antaŭ 2 100 jaroj oni sciis fosi puton por ĉerpi salakvon. En putfosado ili ekster sia atendo malkovris naturan gason kaj nomis tian puton fajra puto. Ili kuiris la putakvon rekte per la gaso por akiri salon.


En la 3-a jc. la salputoj de Sichuan senescepte estis malprofundaj kun larĝa aperturo. Iuj larĝis 100 metrojn, sed profundis nur 10-100 metrojn. Estis malfacile fari tiajn putojn kaj plie la putomuroj estis facile difekteblaj. En la 11-a jc. Sichuan-anoj fosis per borilo vertikalan puton kun aperturo larĝa kiel tiu de bovlo, t.e. la salfaristoj ne bezonis malsupren iri al la fundo por fari la puton pli profunda. Kiel do ĉerpi salakvon de la fundo? Ili el bambuaj tuboj faris simplan pumpilon kun leda piŝto kaj per ĝi ĉerpis salakvon. Tiu metodo poste estis uzata ankaŭ en Yunnan.

En 1835 en la urbo Zigong de Sichuan, oni unuafoje en la mondo boris puton profundan je pli ol 1 000 metroj. Oni diris, ke poste eksterlandanoj uzis tiun metodon en borado de oleputo.


## ANTIKVA POLITIKO PRI SALO

En la ĉina historio estis praktikataj diversaj politikoj pri salo, iuj el ili favoris la landon kaj aliaj  
(*Daŭrigo sur p. 43*)

# Ĉina mono antaŭ 2000 jaroj



Ŝpatforma monero



Konkoformaj moneroj el bronzo

**L**A plej frua ĉina mono estis konko kaj post tio aperis metala mono. En la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.) la metala mono iom post iom anstataŭis la konkan. Tiam pro milita separatismo Ĉinio estis dividita en dekelkajn malgrandajn regnojn. Ĉiu el ili havis la rajton emisii monon. Tial en diversaj lokoj de Ĉinio cirkulis metala mono en formoj ŝpata, glava, ovala kaj ronda.

En la periodo de Printempo kaj Aŭtuno agrikultura produktado multe progresis en la meza baseno de la Flava Rivero. Bronza ŝpato estis prenata kiel ekvivalento en interŝanĝo de varoj. Poste, surbaze de tio aperis la plej frue muldita mono — ŝpatforma monero. Sur la plej frua ŝpatforma monero estis multitaj ideogramoj, ciferoj, ĉielaj fenomenoj aŭ signoj. Ĝi iom post iom maldikiĝis kaj platiĝis kaj surhavis loknomon kaj valoron. El tio videblas, ke la ŝpatforma monero fariĝis pli taŭga por cirkulo. Ĝi fariĝis pli leĝera, malgranda kaj glata.

Komence ĝi pezis 35 g. kaj poste ĉ.10 g. kaj ĝiaj anguloj pli kaj pli malakutiĝis.

Glavforma monero estas bronza kun ringo sur la pinto de la tenilo. Tia mono naskiĝis tiutempe en Qi-regno en la malsupra baseno de la Flava Rivero kaj poste cirkulis ankaŭ en la nordaj regnoj Yan kaj Zhao. La mono muldita de Yan-regno portas ideogramon signifantan "brilo". La nombro de tiaj moneroj nun trovitaj estas la plej granda. La vasta cirkulado kaŭziĝis de la potenco de Yan-regno. Histori-aj materialoj konigas, ke en 284 a.K. ĝia armeo venkis tiun de Qi-regno, okupis la grandan parton de la teritorio de Qi, tiam ankaŭ Qi-regnaroj muldis kaj uzis tian monon. Kaj ankaŭ Zhao-regno, najbara al Qi kaj Yan, por la komerca bezono muldis ĝin. Nun tia mono estas elterigita ne nur en nordorientaj provincoj de Ĉinio, sed ankaŭ en Koreio kaj Japanio.

Ovala monero kaj ora mono cirkulis en Chu-regno sude de la Flava Rivero. La ovala monero estas bronza kaj

konkforma. Tiam estis tre malfacile havigi al si konkono, kaj plie, konkono estis ĉefa mono en Chu-regno, tial en iuj komercaj lokoj oni faris ovalan moneron el bronzo kun intajlo sur la fronta flanko. La ovala monero kun intajlaĵoj kaj truoj impresas kiel stranga vizaĝo, tial oni nomas ĝin ankaŭ monero de diabla vizaĝo. La ora mono fakte estas ora ingoto peza je ĉ. 250 g. kies 90% estas pura oro. Ĝenerale, oni hakis ĝin en malgrandajn pecojn laŭ bezono kaj poste pesis ilin por pagi. Jen la plej frua ora mono kun difinita formo en Ĉinio.

En la malfrua periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) aperis ronda monero kun truo en la mezo. Ĝi estis pli facile portebla ol la ŝpatforma kaj glavforma, tial ĝi rapide cirkulis tuj post sia apero. Ĝi estis la lasta montipo antaŭ Qin-dinastio (221-206 a.K.). Pro malsameco de la muldejoj tia monero estas malsamdika kaj malsampeza, sur ĝi legiĝas ideogramoj montrantaj muldejon kaj va-loron.


Ne estas notoj pri mono en la libroj pri la periodo de Printempo kaj Aŭtuno, ĉar tiutempe la ŝtatoficistoj kaj aristokratoj ne uzis monon, kiu cirkulis nur inter la ordinaraj popoloj. En la periodo de Militantaj Regnoj industrio kaj komer-

co estis ne plu monopoligitaj de aristokratoj kaj mono ludis pli kaj pli grandan rolon. Tiam oni uzis valorajn metalojn por interŝanĝi ilin kontraŭ valoraj kaj luksaj objektoj aŭ granda kvanto da varoj, sekve de tio multe da valoraj metaloj ekfunkciis kiel mono vaste cirkulanta kaj en historiaj libroj ofte legeblas, kiel aristokratoj elspezis multe da oro. Tiam bronza mono estis vasta uzata de la ordinaraj popoloj. En la ĉefurboj de pluraj regnoj arbore stari vendado de vinoj, ŝuoj, rizo, ĉevaloj kaj oraĵoj. El historiaj dokumentoj ni sciiĝis, ke tiam 10 litroj da milio kostis 30 monerojn kaj 1.5 kg da kanabo — 10 monerojn kaj unu ŝafo — 250 monerojn.

En 221 a.K. la Unua Imperiestro de Qin-dinastio unuigis Ĉinion. Por firmigi la centralizismon li unuigis la skriblingvon kaj mezursistemon pri longo, volumeno kaj pezo kaj abolis la komplikajn sistemojn de mono praktikatajn en diversaj regnoj. Surbaze de la ronda monero uzata en Qin-regno, li unuigis la unuton kaj formon de la ĉina

mono. Li difinis, ke la ora monero estu supera, uzata en la rondo de regantoj kaj la bronza monero estu ordinara kun ideogramoj signifantaj "Duona Taelo". La monero estas ronda kun kvadrata truo en la mezo. De tiam la rondaj bronza moneroj kun kvadrata truo cirkulis 2000 jarojn en Ĉinio kaj estis anstataŭitaj de maŝinfaritaj kupraj moneroj nur en la 19-a jc.

Antaŭ Qin-dinastio la truoj de moneroj plejparte estis rondaj, dum tiu de la monero kun ideogramoj "Duona Taelo" estis kvadrata, tio estas granda ŝanĝiĝo. La antikvaj ĉinoj opiniis, ke la ĉielo estas ronda kaj la tero kvadrata. La bronza monero en ronda formo kaj kun kvadrata truo aludas la ĉielon kaj teron. Oni diris, ke la Unua Imperiestro de Qin-dinastio muldigis la ĉielan volon kaj imperiestrecon en la monero: la ronda formo aludas la ĉielan volon kaj interna kvadrato imperiestrecon. Por faciligi portadon oni ŝnure interligis tiajn monerojn kaj portis ilin sur la talio.



Bronzaj moneroj "Duona Taelo"



Glavforma monero

# La sorto-decida ekzameno

**Ĉ**IUN julion en Ĉinio okazas la tutlanda altlernejo-enira ekzameno, kiu en tri tagoj fariĝas fokuso preskaŭ de la tuta lando. Plej maltrankvilaj estas la ekzamenatoj kaj iliaj familianoj, ĉar ĉ. 60% da ekzamenatoj ne estos akceptitaj de la altlernejoj. Kaj en la nuna Ĉinio malhavi altlernejan diplomon signifas pli da malfaciloj en okupo-elekto. Tiusence la nomita ekzameno decidas la sorton de la ekzamenatoj.

## APARTA ATENTO

Preskaŭ ĉiuj ekzamenatoj, kiel solinfanoj, estas akompanataj de la gepatroj ĝis la pordoj de la ekzamenajoj. Dum la geknaboj cerbumis en la ekzamenajoj, ekstere la gepatroj tri-kvinope starante rakontis pri siaj propraj travivaĵoj. Iu patrino diris: "Krom ekzamenado, mi faris ĉion por mia infano."

Tion sentis ankaŭ la instruistoj. Dum la lasta jaro antaŭ la ekzameno la instruistoj de la tria klaso de supera mezlernejo gvidis la lernantojn fari sennombrajn simulajn ekzercojn krom la kutima instruado. Antaŭ la nomita ekzameno ili ripetade admonis la lernantojn ne streĉiĝi, bone ripozi, ne forgesi kunporti fontoplumon kaj konfirmilon pri partopreno de la ekzameno...

Ankaŭ la socio donis apartan atenton al la ekzameno. Nemalmultaj institucioj donis 3-ta-

gan libertempon al la laboristoj kaj oficistoj, kies infanoj devis partopreni la ekzamenon. En iuj urboj oni oportunigis veturadon kaj iradon de la lernantoj en ĉemizo kun la vortoj "altlernejo-enira ekzameno" eĉ en trafika ŝtopado. En aliaj urboj bruega konstruado ne iris post la 10-a vespere dum prepariĝado por la ekzameno kaj dum la tri-taga ekzameno.

## ELEKTI KAPABLULOJN PER EKZAMENO

Ĉinio havas pli-ol-3000-jaran historion pri elekto de kapabluloj per ekzameno. Je la komenco la ŝtato preskribis, ke ĉiuj ĝiaj regnoj devas senprokraste sendi al la imperiestro kapablulojn elektitajn per gubernia ekzameno. La elstaraj kapabluloj havos la ŝancon lerni en la "ŝtata lernejo". Sukcesinte en la diplomitiĝa ekzameno ili ricevos registaran oficon. Post Tang- kaj Song-dinastioj (618-1279) maturiĝis la kapablulo-elekta sistemo, kiu daŭris ĝis la komenco de la 20-a jarcento.

En 1949 fondiĝis la nova Ĉinio. Per altlernejo-enira ekzameno la ŝtato elektis elstarajn ekzamenatojn kaj poste edukis ilin kiel fakulojn de la socio. Dum la deko da jaroj de la kultura revolucio anstataŭ la sistemo de altlernejo-enira ekzameno oni praktikis la sistemon de rekomendado de lernantoj al altlernejo.

En 1977 restariĝis la sistemo de altlernejo-enira ekzameno. 5.7 milionoj da antaŭaj diplomitoj el malsuperaj kaj superaj mezlernejoj, kiuj eklaboris jam en urboj aŭ en kamparo, denove ekhavis la ŝancon partopreni la altlernejo-eniran ekzamenon. Nun multaj el ili estas erudiciuloj, artistoj aŭ entreprenistoj.

## INTENSA KONKURO

En la nuna Ĉinio la altlernejo-enira ekzameno estas dividita en la kategoriojn de literaturo kaj historio, natursciencoj kaj teknikoj, kaj artoj. Por ĉiuj partoprenantoj la ekzamenoj de lingvoj ĉina kaj fremda kaj matematiko devas esti trapasitaj. Krome, la ekzamenatoj por literatura kaj historia fako devas partopreni la ekzamenon de historio kaj politiko; tiuj de naturscienca kaj teknika fako — tiun de fiziko kaj kemio; tiuj de arta fako devas partopreni ekzamenojn antaŭe artan kaj poste la unuecan landskalan. Ekskluzive de Ŝanhajo, la ekzamenaj demandoj por la unuaj du kategorioj estas faritaj de la Eduka Ministerio de Ĉinio.

Kvankam malsamis la ekzamenaj demandoj en la pasintaj jaroj, tamen ĝenerale samis la lernobjektoj. Kial do la ekzamenatoj sentis pli kaj pli grandan premforton? Ĉar pli kaj pli multiĝis la ekzamenatoj. Enketo montras, ke en 1955 inter la 99 000 ekzamenatoj 97 000 estis akceptitaj kaj en la 50-aj jaroj la akcepta proporcio ĉiam estis 1:1.1. En 1979, la tria jaro post la restariĝo de altlernejo-enira ekzameno, estis kulmino de aĝotaŭgaj ekzamenatoj. En tiu jaro 7 265 000 abiturientoj partoprenis en la ekzameno, tamen altlernejoj akceptis 275 000 ekzamenatojn, inkl. de neabiturientoj. Do la akcepta proporcio estis 1:27.

Tiu stato daŭris kelkajn jarojn. Dank' al funkciigo de profesiaj kaj teknikaj mezlernejoj,



evoluo de televidaj, korespondaj kaj vesperaj altlernejoj kaj praktikado de la politiko pri pagata lernado en altlernejoj, pli multiĝis la ekzamenoj por altlernejoj. De 1995 ĝis nun la akcepta proporcio estas ĉ. 1:2.5; kaj en grandaj urboj, kiaj Pekino kaj Ŝanhajo, ĝi estas 1:1.2.

Tamen ankoraŭ ne estis solvita la problemo de manko de altlernejoj, sopiro al fama altlernejo kaj furora fako. Tion kaŭzis multaj faktoroj: Unuflanke, pro disvolviĝo de alt-teknikaj industrioj kaj ŝanĝiĝo de okupodona cirkonstancaro, la lernantoj esperis studi fakon furorantan en la 21-a jarcento por havi lokon en la estonta socio, kaj la gepatroj pagis multe por lernado de siaj infanoj, dezirante, ke ili trovu altsalajratan okupon, fininte la lernadon. Aliflanke la dungantoj preferis diplomitojn el famaj altlernejoj; ofte okazis, ke unu saman diplomiton de tia altlernejo estis preferata samtempe de kelkaj institucioj; male, la diplomitoj el ordinara altlernejoj ne estis tiel feliĉaj. Sekve de tio, la decido de vizitota altlernejo kaj studota fako fariĝis tre serioza por la lernantoj kaj iliaj gepatroj.

## PERSPEKTIVO ĈAGRENA KAJ ĜOJIGA

Troa sopiro al famaj altlernejoj, tro multe da studentoj en fakoj de juroscienco, ekonomiko, financo, internacia komerco, negoco de loĝeja proprieto, elektroniko, arkitekturo, aŭtomatiko ktp., ĉio ĉi tio kontrastis kun neglekto de la altlernejoj pri agronomio kaj geologio, kaj kun tiu de la fakoj pri fundamentaj teorioj. Iu instruisto konsilis al lernantoj anonci sin por normala instituto urĝe bezonata de la ŝtato, en kiu ili ne nur ĝuos stipendion, sed ankaŭ estos liberaj de lernokotizo. Tamen ili diris: "Nun ni ŝparas monon, tamen estonte ni malmulte enspezos." Tio multe maltrankviligis



## Ekster ekzamenejo

koncernajn fakulojn. Se tio daŭros longe, malfortiĝos la fakoj fundamentaj kaj aplikaj, kaj ankaŭ malfacile aperos fakoj de koneksaj sciencoj. Aliflanke, tro multe da studentoj lernos en samspecaj fakoj, tio kaŭzos krizon, ke malfacilas laborigi la studentojn post ties diplomiĝo.

Tiuokaze oni reordigis la normojn de minimuma poentaro por akcepto kaj lernopago kaj plioftigis la kontakton kun la studentoj kaj iliaj gepatroj, por ke ili pli multe konu la koncernajn fakojn kaj la bezonon de la ŝtato. Vizaĝe al la problemoj kaŭzita de la porekzamena edukado, la Eduka Ministerio de Ĉinio ekpraktikis la edukadon por multflankaj kvalitoj. En 1995 la nombro de objektoj por la altlernejo-enira ekzameno reduktiĝis de 6 al 5, por malpezigi la ŝarĝon de la lernantoj.

En la pasintaj 20 jaroj senĉese reformiĝis kaj evoluis la sistemo de altlernejo-enira ekzameno. Dume el la 58 milionoj da ekzamenatoj 11 milionoj ricevis la ŝancon daŭre lerni. En Ĉinio la nombro de studentoj konsistigas 7% de tiu de la samaĝuloj, malpli multe ol la internacia averaĝa procento (18-20%). Be-

daŭrinde, pro limigo de ŝtata forto, por la ĉinaj geknaboj, la ŝanco lerni en altlernejoj estos ankoraŭ malfacile akirebla en la proksima estonteco.

Dum funkciigado de altlernejoj ĉiuspecaj privataj altlernejoj progresis, kun nombro egala al tiu de la ŝtataj, tamen ankoraŭ ne sufiĉe kontentigaj estas iliaj famoj, instruaj kondiĉoj kaj kvalitoj. Estro de la Xi'an-a Privata Traduka Instituto diris: "En la mondo multaj unuaklasaj altlernejoj estas privataj. Ni havas memfidon famigi nian privatan altlernejon por ĉinaj geknaboj." Nun diplomitoj de la instituto laboras en la tuta lando, ĉ. milo da ili lernas aŭ laboras eksterlande. Iuj el ili jam akiris magistrecon.

Dank' al evoluo de sciencoj kaj teknikoj kaj retiĝo de edukado, en la 21-a jarcento la lernantoj espereble sidos antaŭ komputilo en sia domo por viziti la famajn altlernejojn, kiaj Qinghua-universitato kaj Pekina Universitato en Ĉinio, Harvard-universitato kaj Kembriĝ-universitato eksterlande... Tiam la gepatroj eble rakontos al ili, kio okazis en ĉiu julio fine de la 20-a jarcento. ■

## MALJUNAJ ARBOJ EN PEKINO

En Pekino kreskas multaj maljunaj arboj. Por konstruado oni iam translokas ilin, sed ofte, cedas lokon al ili. En suda Pekino estas aŭtovoja trefokruĉiĝo, kiu tuŝas antikvan urbomuron norde kaj antikvan pagodon sude. Sub la trefokruĉiĝo kreskas maljuna arbo. Por protekti la arbon oni faris trarompon sur la planko de la trefokruĉiĝo, tiel ke ĉiuj veturiloj devas preteriri ĝin. Am-

baŭflanke de la trarompo okulfrapas la vojsignoj.

En la urbo sumas pli ol 40 mil pli-ol-100-jaraj arboj, el kiuj 6 213 estas pli-ol-300-jaraj, kaj nemalmultaj antikvaj konstruaĵoj dissemiĝas inter ili.

Ĉiuj tiuj arboj havas siajn "legitimaĵon", "arkivon" kaj vivsferon fiksitan balustrade.

En Tanzhe-templo de Pekino estas ginko plantita en Liaodinastio (907-1125). Ĝi altas pli ol 30 metrojn kaj havas trunkon brakumeblan kune de sep homoj

mano en mano. Legendo diras, ke tiu arbo eligis el la radiko freŝan trunkon ĉiufoje, kiam nova imperiestro surtroniĝis. Multajn jarojn poste, tiuj trunkoj kuniĝis kun la ĉefa trunko. Ĝuste pro tio, imperiestro Qianlong de Qing-dinastio (1736-1796 sur trono) titolis ĝin arbo de imperiestro.

En elementa lernejo de la gubernio Miyun de Pekino majestas pli-ol-1300-jara ginko, kies plej granda diametro atingas 260 cm. Somere la lernantoj estas skribe ekzamenataj en ĝia vaste ga ombro kaj ilia instruisto observas ilin apude.

## EN PRODUKTEJO DE AKVOMELONOJ

Daxing-gubernio en suda Pekino estas fama produktejo de akvomelonoj. En somero, kiam akvomelonoj maturiĝas, sur stratoj en la gubernia urbo aperas veturiloj plenaj de akvomelonoj. Iuj kultivistoj atendas klientojn, aliaj sidas sub ombroriĉaj arboj kvazaŭ dirante: "Pro kio ni maltrankviliĝas! Ĉu tiuj bonaj akvomelonoj ne forvendiĝos?!" Intertempe revendistoj el aliaj lokoj marĉandas kun kultivistoj inter la veturiloj.

Jam antaŭ longe famiĝis akvomelonoj de Daxing, kiujn favoris rivereto trafluanta la gubernion. Foje okazis inundo kaj breĉiĝis la digo. Sekve de tio, aperis aluvia ebenaĵo el sabla tero, tre taŭga por kresko de akvomelonoj. Kaj plie, en la loko regas modera klimato. Sub tiuj kondiĉoj la tieaj akvomelonoj estas dolĉaj.

En kampo de akvomelonoj de la distrikto Panggezhuang kultivisto Li rikoltis akvomelonojn kune kun siaj filo kaj nepino. Li kun siaj kvin familianoj kultivis seponan hektaron da akvomelonoj. Pro lerteco liaj akvomelonoj estis pli grandaj ol tiuj sur la najbaraj kampoj.



Reverdas la antikva arbo.

Ĉe lia kampo estis budo el arbobranĉoj kaj pajlo. Antaŭe la similaj budoj estis destinitaj por gardantoj de la akvomelonoj, sed nun la afero ŝanĝiĝis. Li diris: "Nun ĉiu familio kultivas akvomelonojn kaj tia budo estas uzata nur kiel ŝirmejo, sed ne gvatejo kontraŭ ŝtelado."

Nun multas vendmanieroj de



Dolĉaj estas la akvomelonoj mem elektitaj.

akvomelonoj en la gubernio. De 1988 en ĝi okazas akvomelona festivalo ĉiujare. Ĝi estas granda spektaklo por Daxing-anoj. Profitante de la okazo, krom vendi akvomelonojn, ili ankaŭ kontaktiĝas kun diversrondaj personoj kaj venigas multajn investantojn por konstruado de la gubernio.

## KURIOZAJ TESTUDOJ KAJ TRIONIKSJOJ

En akvario de Nankino en la malsupra baseno de Yangzi-rivero, Ĉinio, vivas kuriozaj testudoj kaj trioniksjoj (*Trionyx sinensis*). Iuj testudoj havas muzelon similan al beko de aglo kaj portas la nomon aglobeka testudo. Tiuj bestoj, kun plata ŝelo, ne povas enŝovi en ĝin siajn kapojn, membrojn kaj longan voston.

En la akvario estas oraj trioniksjoj, tutkorpe orflavaj, kun diafana ŝelo, tra kiu videblas iliaj ripoj kaj vertebro. Tie estas ankaŭ blankaj trioniksjoj kun diafana ŝelo kvazaŭ jada skulptaĵo. Tie

vivas diversaj testudoj: ĝibhavaj, sespiedaj, sesokulaj, buntaj, serpentkolaj, moskaj, araneaj k.a. el aliaj landoj.

En ĝi eksponiĝas pli ol 1.5 mil testudoj kaj trioniksjoj de 98 specioj. Tie videblas ankaŭ specimenoj de tiaj bestoj, inkl. de fosilio de testudo vivanta antaŭ 50 milionoj da jaroj.

Post multjara bredado kaj trejnado iuj testudoj ne estas timemaj. Ili kapablas prezenti vetkuron, ŝnurtiron, interbatalon ktp. Kaj 300-jara ĥelonio scipovas rampi kun infaneto sur si.

## "MULAN" EN USONO

La movbilda filmo "Mulan", adaptaĵo de ĉina popola rakonto, farita de Disney de Usono, estis projekciata en Usono kaj laŭdata de infanoj kaj iliaj gepatroj.

Estas la unua fojo por Disney adapti la ĉinan popolan rakonton al movbildo. La rakonto temas, ke Mulan, heroino de la antikva Ĉinio, vire alivestite partoprenis en batalo por defendi sian patrolandon. La rakonto estas bone konata en Ĉinio.

Rigardinte la filmon, ĉindevena knabo, kiu kreskis en Nov-Jorko, diris kun ĝojo kaj fiero: "Estas tre malofte rigardi en usonaj filmoj figurojn de ĉinoj, kia Mulan, kiu arde amas siajn gepatrojn kaj patrolandon."

En Nov-Jorko iu patrino kun siaj tri infanoj rigardis la filmon. Ŝi diris: "La ĉina kulturo estas ĉiam mistika por ni. La bela kaj plastika filmo kontentigas la scivolemon de usonanoj pri Ĉinio."

Filmaj recenzistoj opinias: "La filmo sukcese konigis al usonanoj la ĉinan kulturon. Tio estas rekomendinda."

(Daŭrigo de p. 37)

malutilis al ĝi. La politiko praktikata de Qi-regno en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.) ja estis pozitiva. Guan Zhong estis grava politikisto de Qi-regno. Li bone sciis ekonomikon. Li opiniis, ke oni avidas profitojn kaj evitas danĝerojn, kio estas tre komprenebla por la homoj. Guan diris, ke komercistoj senlace klopodas tagnocte ĝuste por profito, tial la regantoj devas fari ĉion por gajni profiton, potencigi la landon kaj riĉigi la popolon.

Foje Xiao Bai, suvereno de Qi-regno, diris al Guan Zhong, ke li volas imposti domojn, arbojn, brutojn, kampojn kaj loĝantojn por pliigi la financon de la registaro. Guan Zhong malaprobis tion, dirante, ke tio signifas devigi la popolon malkonstrui domojn, forhaki arbarojn, buĉi brutojn kaj forlasi kampojn, sekve de tio, ili malproksimiĝos de la regnestro, sed Qi, kiel regno montoza kaj ĉemara, devas ĉasi la profitojn de montoj kaj maroj kaj plej grave estas monopoligi vendon de salo, ĉar salo estas same grava kiel rizo al la popolanoj, kaj tia politiko estas akceptebla de ili. Guan Zhong opiniis, ke en la terkultura sezono la registaro devas malpermesi al la loĝantoj fari salon, tiam la ŝtato entreprenu salfaradon kaj kolektu salon, kaj kiam altiĝos la prezo, ĝi vendos ĝin al aliaj landoj por granda profito.

La regnestro akceptis la proponon de Guan Zhong, establis administracion pri sala farado kaj transportado en salfrejo kaj publikigis politikon pri salo. De tiam la financaj statoj de la regno fariĝis pli kaj pli bonaj, la loĝantoj estis ne plu ĝenataj de impostoj kaj regnestro Xiao Bai fariĝis la unua regnestro venkinta en la batalo por hegemonio en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno.

# Posedanto de kaĉo-manĝejo

Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG



Prospera kaĉo-manĝejo



Yin Xiangyun

Absorbiĝo en manĝado




Yin Xiangyun kaj ŝiaj familianoj



Tio estas ordinara manĝejo kun alte pendanta ŝildo, sur kiu estas skribite: Kaĉo-manĝejo Xiangyun. La posedanto nomiĝas Yin Xiangyun.

Antaŭe sinjorino Yin laboris en la Handan-a Tria Plasta Fabriko de Hebeiprovinco. Senlaboriĝinte en 1993, ŝi ĉagreniĝis, tamen antaŭ la severa realo ŝi devis serĉi vivrimedojn.

Ŝi diris al mi, ke malproksime de ŝia domo estas manĝeto-strato. Ĉiumatene multaj klientoj elektis inter abundaj manĝaĵoj, tamen ŝi rimarkis, ke tie ne troviĝas milia kaĉo. Do, ŝi decidis sin okupis pri tio.



“Jam pli ol kvar jaroj pasis, kaj la kaĉo-budo fariĝis fiksa manĝejo kun 4-5 dungitoj. Mi engaĝis kuiriston. Ankaŭ la specoj de manĝaĵoj pli kaj pli multiĝis. Klientoj nomas mian kaĉon mili-kaĉo de Xiangyun.”

Kelkjare Xiangyun ne nur mem vivas de kaĉovendado, sed ankaŭ donas laboron al aliaj tri senlaborĝintoj.

Iu kliento diris al mi, ke li estas alilokano komercanta en Handan kaj ĉiumatene vizitas la manĝejon de Xiangyun. Li estis kontenta, ke la kaĉo estas bongusta kaj la servistinoj afablaj kaj fervoraj.

#### Servo al alilanda kliento



Hejtado ĉe tagiĝo

# Ĉiopovaj varoj

(Huj-a popolrakonto)

**A**NTAŬE en nia vilaĝo estis riĉulo, kiun oni nomis Dikkapulo la Granda. Li havis kelkajn edzinojn, tamen nur unu filon. Solfilo en riĉa familio estas ĉiam tro dorlotata. Dikkapulo la Eta iĝis 25-jara kaj tre similis al sia patro. Li faris nenion alian krom diboĉi.

Dikkapulo la Granda havis transportan karavanon el 90 ĉevaloj kaj 30 dungitoj. Ĉiufoje, kiam la karavano revenis, lia korto pleniĝis de arĝentaj moneroj kaj diversaj varoj. La dungitoj babladas pri la vizititaj lokoj. Ĉiufoje, kiam ili parolis pri fruktoj, Dikkapulo la Eta salivumis.

Foje Dikkapulo la Eta perdis hazardludon. Li iris al sia patro: “Paĉjo, mi volas vojaĝi kun la karavano, mi gajnos monon kaj ĝuos la vojaĝon.” Lia patro ĝojigis: “Antaŭe la dungitoj ofte trompis min. Fi! Mi nutras ilin, tamen ili diris, ke mia posedaĵo venis de ilia laboro. Fi! Aĉuloj. Nun vi iros kun ili, kaj mi estos trankvila. Bone laboru, mia kara. Kiam mi mortos, ĉio en la hejmo apartenos al vi.”

Dikkapulo la Granda kunvokis la dungitojn: “Mia filo gvidos la karavanon. Vi zorgu nur pri la ĉevaloj. Mia filo respondecos pri la komercado, kaj vi ĉiuj devas obei lin.” La dungitoj nenion diris. Ili preparis ŝtofojn, ornamaĵojn, salon kaj aliajn varojn — ŝarĝo sufiĉa por 90 ĉevaloj. Por beni la vojaĝon, en la sekva tago Dikkapulo la Granda petis imamon preĝi kaj invitis siajn parencojn al bankedo. En la tria

tago la karavano ekiris.

Kvankam Dikkapulo la Eta unuafoje komerce vojaĝis, tamen li neniom timis, pensante, ke komercado estas sama kiel hazardludo, kiu dependas de saĝo, kaj se li aĉetos multe da ĉiopovaj varoj, certe li gajnos multe.

Ili atingis iun guberniurbon. Post manĝo Dikkapulo la Eta promenis surstrate. Ĉe iu butikostaris multaj homoj. Li aliris kaj vidis, ke iu viro havas en la mano bambuan bastoneton kun tufo da haroj ĉe ĝia fino. La viro trempis la bastonon en nigra likvaĵo kaj ion pentris sur papero. Li vendis la pentraĵon kaj ricevis multe da arĝentaj moneroj.

“Kio ĝi estas?” Dikkapulo la Eta demandis siajn dungitojn.

“Ĝi estas peniko. La sinjoro bele kaligrafas kaj per la peniko li ĉiutage enspezas multe.”

Li ekpensis: Jen ĉiopova varo, kaj mi devas aĉeti kelkdek tiajn penikojn. Li diris al la dungitoj: “Demandu lin, kiom da penikoj li havas, la tuton mi aĉetos.” La dungitoj ne kuraĝis malobei kaj iris demandi. La kaligrafo ne volis forvendi la penikojn, sed post ilia insista petado li konsentis vendi du penikojn, ĉiu kontraŭ dek ĉevalŝarĝoj da varoj. Dikkapulo la Eta metis la du penikojn en sian poŝon kaj ĝojis: “Ha! Nur 20 ĉevalŝarĝoj. Mi havos ĉion. Ĉiopova varo alportos multe da mono!”

Ili daŭre iris. Tagmeze ili ripozis ĉe la vojo kaj vidis kamparon, kiu prilaboris teron.

“Kion vi uzas?” demandis lin

Dikkapulo la Eta.

“Ŝpato, per kiu mi gajnas oron, arĝenton, manĝaĵon kaj trinkaĵon,” respondis la kamparano.

“Jen ĉiopova varo. Kiom vi havas?”

“Nur unu sufiĉas por mi. Kun ĝi mi neniam ĉagreniĝis pri la vivo.”

“Vendu ĝin al mi. Diru, kiom da ĉevalŝarĝoj vi postulas.”

La kamparano postulis 30 kaj donis al li la ŝpaton.

Dikkapulo la Eta gaje diris al si mem: “Kun ĝi mi havos vestojn kaj manĝaĵojn. Nur 30 ĉevalŝarĝoj. Ĉiopova varo alportos multe da mono.”


Ili atingis grandan guberniurbon. Ĉe la stratokruco multaj rigardis ion. Dikkapulo la Eta enpuŝigis kaj vidis, ke iu ludas per malgranda ligna kesto. “Kion li faras?” li demandis. “Estas magio,” respondis la dungitoj. La magiisto montris la keston al la rigardantoj — ĝi estas malplena. Li metis tukon sur ĝin kaj kriis “Venu, venu, venu!” Li malrapide forprenis la tukon — en la kesto aperis pladoj, bombonoj kaj eĉ moneroj.

Jen varo pli bona. Dikkapulo la Eta ordonis: “Aĉetu la keston per ĉiuj niaj varoj restaj.”

“Tio estas nur ludo.”

“Fermu vian buŝon! Obeu min.”

Li ricevis la keston kontraŭ 40 ĉevalŝarĝoj da varoj. “Kun ĝi mi havos vestojn kaj manĝaĵojn. Ha! Ĉiopova varo alportos multe da mono.”



Nun li havis nur 90 ĉevalojn. En la gastejo li pensis: Tiuj dungitoj kaj ĉevaloj nun taŭgas por nenio, kaj mi devas pagi multe por ilia loĝado, kial mi ne forpelu ilin. Li do disdonis la ĉevalojn al la dungitoj, kiuj ĝoje foriris.

Ankaŭ li ĝojis: "Stultuloj!"

Nun li havis nur unu ĉevalon kaj la tri ĉiopovajn varojn. Post dutaga diboĉado en la guberniurbo li ekiris hejmen.

Li sciis nur rajdi sur ĉevalo, sed neniam nutris ĝin. La ĉevalo falis kaj ne povis iri. Li vipis ĝin, kaj ĝi ne moviĝis. "Mi forĵetos vin." Li piediris kun la ĉiopovaj varoj.

Tagmeze li estis soifa kaj malsata. Doloris liaj piedoj. Li sidis ĉe la vojo kaj elprenis la ĉiopovajn varojn. Unue li kovris la keston per mantuko, dirante: "Bongustaĵoj, venu! venu!" Li malrapide forprenis la tukon, sed nenio venis. Li koleriĝis kaj vipis la keston, kaj

ĝi difektiĝis.

"Mi ankoraŭ havas la ŝpaton." Li batis teron trifoje per ĝi, dirante: "Mi ne bezonas belajn vestojn, nur bongustaĵojn mi postulas."

Sed nenio aperis krom la tero. Li provis ankoraŭfoje, okazis la samo. Li eksplodis kaj forĵetis la ŝpaton, kiu tamen returne frapis lian kapon. Dolorege.

"Ne gravas, mi perdis du, tamen kun la lasta mi sukcesos. En la urbo la peniko alportos al mi monon." Li penis iri plu.

La suno estis subiranta. Li atingis vilaĝeton. Li eksidis kaj strekis ion sur la tero per la peniko. Jen la ĉiopova varo ekfikis — venis kelkaj scivolemuloj, poste pli multaj kolektiĝis. Li ĝojiĝis kaj demandis: "Kiu pagos?" Venis neniu respondo. Plurfoje la samo. La rigardantoj ekridis. La suno malaperis. Ĉiuj foriris. Dikkapulo la Eta ploregis: "Paĉjo... Panjo..."

(Daŭrigo de p. 12)

la kvara ŝanĝo (edziĝo kaj patriĝo) li eniris kiel ĉefadministranto. Intertempe li akiris novaĵojn pri la urba kuzo: Koninte la pli bonan situacion de la najbara Francio, li tien transloĝiĝis post edziĝo. Tamen ĉe la komenco li devis labori kiel helpanto de masonisto en negranda vilaĝo...

Nun permesu al mi riveli, ke mi estis la kamparano. Okazis ke ia stranga ĝojo invadis mian koron. Kun neretenebla rideto mi frotis miajn manojn imagante proksiman renkontiĝon kun la kuzo: post kutimaj familiaraj salutoj dum karesaj ŝultrofrapetoj mi flustrus al li: "Nu, kara kuzo, kiu estas nun kampulo?"

Sed bonsorte, neniam venis la okazo. Bonsorte! Ĉar — kiu scias — eble post la prova periodo li jam povis eklabori en grava banko kaj eĉ transloĝiĝi al Parizo! Dum mi, post tiom da jaroj de brue svarma urba vivo, jam komencis sopiri reiron al kampara trankvileco, por tie ĝui, krom pli puraj akvo kaj aero, ankaŭ freŝajn fruktojn kaj legomojn memkulturatajn en ĝardeno...

Evidentiĝis: Ne decas fieri pro ajna situacio en nia konstante varianta mondo. ■

\* Lluís Armadans i Marfa naskiĝis en Moia, Barcelona provinco, 1925. Tre juna li konis Esperanton, ĉar lia kvar jarojn pli aĝa frato Josep (1921-1983) estis bona amiko de Ramon Molera i Pedrals (1922-1983), grava pioniro frue kreinta vilaĝan grupon; 16-jara, li jam estis UEA-delegito; 30-jara, li kreis kaj gvidis unuan perkorrespondan kurson oficiale registritan; li estis ĉef-delegito de UEA por Hispanio de 1958 ĝis 1973, kiam li devis rezigni pro sanstato. Dum lastaj jaroj li reordigis akumulitajn materialojn kun la celo fondi bibliotekon. Nun kun lia nomo ĝin daŭre pliampleksigas lia filino Ana Maria. De 1977 li pritraktis peradon de "El Popola Ĉinio".

### Paco-kompanio servas al vi

La Paco-kompanio (Ĉinio) por konsultiĝo pri internacia afero  
 Servas al investantoj, turistoj kaj fakuloj:  
 Importo kaj eksporto de komercaĵoj;  
 Laboro en Ĉinio; internacia geedziĝo.  
 Adr.: Direktoro Ling Bo, P.O. Box 2, CN-230001, Hefei, Ĉinio.  
 Tel/Fax: +86-551-2632545; -4484606  
 Hejmpaĝo: <http://www.online.ah.cn/pac/>  
 Ret-poŝto: [cnhflib@public.hf.ah.cn](mailto:cnhflib@public.hf.ah.cn)

# Kiel preventi infektan malsanon en Ĉinio?

de YAN DIYING\*

*Mi estas epidemiologo, mi volus pli bone scii pri infektmalsanoj en Ĉinio, profilaktiko, vakcinado ktp.*

VLADIMIR R. LEMELEV (Uzbekistano)

EN iu hospitalo de Pekino, brakumante aŭ tirante infanojn oni atendis en longa vico. Malsame kiel aliaj gepatroj de malsanaj infanoj, ili aspektis trankvilaj. Ili venis tien, por ke iliaj infanoj ricevu inokuladon. Nepo de s-ino Lin estas unu-jara. Hodiaŭ li tie ricevis vakcinon kontraŭ poliomjelito. Ŝi diris: “Nunaj infanoj estas feliĉaj. Kiam mi estis juna, sur strato mi ofte vidis lamulojn suferintajn de sekvaĵo de poliomjelito.”

Antaŭ 50 jaroj, oni mortis ĉefe de infektmalsanoj, tiam la averaĝa vivodaŭro de la ĉinoj estis nur 35 jaroj. Poste dank’ al bonigo de higiena imuniga sistemo kaj praktikado de sinteza imuniga metodo, en Ĉinio infekta malsano ne plu estas inter la dek gravaj malsanoj, kiuj kaŭzis morton, kaj la averaĝa vivodaŭro de la ĉinoj superis 70 jarojn. Nun en Ĉinio malaperis variolo, pesto estas bridita, suferantoj kaj mortintoj de morbilo, difterio, tetanoso kaj poliomjelito ege malmultiĝis. Antaŭe morbilo ofte epidemiis, preskaŭ neniu infano povis ĝin

eviti, nun pro multjara penado, en multaj regionoj ne ekzistas morbilo, nek novaj poliomjelito-suferantoj.

Liu Yulong vivas en fora kamparo de norda Ĉinio. Antaŭ kelkaj jaroj li suferis de tuberkulozo. Post ĝustatempa kuracado, li resaniĝis kaj nun povas labori. Li ekscitite diris: “Antaŭe suferantoj de tuberkulozo atendis nur morton. Sed, post kiam mi malsaniĝis, laborantoj de imuniga kuracejo vizitis min kun medikamentoj, regule gvidis min fari resanigajn ekzercojn, kaj la kuracado estis senpaga.”

Pro serioziĝo de tuberkulozo en la mondo, en 1993 la Monda San-Organizo deklaris, ke la mondo eniris en la urĝan staton de tuberkulozo, ke ĉiuj landoj alprenu rimedojn por preventi kaj bridi tuberkulozon. En Ĉinio mortintoj de tuberkulozo estas ege pli multaj ol tiuj de aliaj infektaj malsanoj. En la kamparo estas pli alta morbokvanto ol tiu en la urboj. Parolante pri prevento de tuberkulozo de Ĉinio en la lastaj jaroj, s-ino Wang Zhao, estrino de la

Departemento de Brido de Malsanoj sub la Ministerio de Publika Sano, diris: “Por preventi tuberkulozon oni faris laŭstadian preventan planon. En la vasta kamparo oni ellaboris projekton, kiu rilatas al 680 000 000 loĝantoj. En tiuj regionoj la imunigaj kuracejoj registras malsanulojn kaj kuracas ilin per mallongtempa gvida kuracmetodo, rekomendita de la Monda San-Organizo kaj malsanuloj ĝuas senpagan medikamenton kaj servon por ricevi kompletan kuracadon. Krom tio, kuracistoj donas konsultiĝon al malsanuloj kaj vizitas ilin post ilia resaniĝo. La projekto estas bazita sur kredito de la Ministerio de Publika Sano de Ĉinio kaj la Monda Banko.”

Post penado de kelkdek jaroj, nun en la tuta Ĉinio oni stariĝis apartajn imunigajn organizojn kaj sanitaran reton, kiu plifortigas la kontrolon, administradon kaj kuracadon. Tio ebligis al ĉinaj kuracistoj akumuli sperton kaj ellabori laboran sistemon pri informado de epidemia situacio, administrado de infektmalsanoj,





Kuracistino manĝigas al bebo pilolon kontraŭ poliomjelito.

esploro de epidemio, traktado, eduko pri sano, kuracado kaj resanigo. Antaŭe ĝenerala opinio estis: "Post katastrofo aperos epidemio." En la lastaj jaroj en Ĉinio ofte okazis naturaj katastrofoj, ekz. inundo, tertremo kaj neĝŝtormo. Pro penado de kuracistoj, post la katastrofoj neniu epidemio okazis.

En Ĉinio la mortokvanto de epidemio malgrandiĝis, tamen la morbokvanto ankoraŭ estas alta,

precipe disenterio, hepatito ktp; iuj malaperintaj malsanoj reaparis, ekz. sifiliso kaj blenoreo; novaj epidemioj aperis kaj disvastiĝis, ekz. antaŭe aidsos aperis nur en suda Ĉinio, tamen nun en aliaj provincoj estas aidsos-suferantoj. La disvastiĝo de epidemio rilatas al la malforta koncepto de la publiko pri prevento de malsanoj kaj neefikaj kontraŭrimedoj de iuj lokoj. Ekz. en la 80-aj jaroj en la tuta Ŝanhajo

disvastiĝis hepatito A kaŭzita de manĝado de krudaj konkuloj.

Tial prevento de epidemio ankoraŭ estas grava problemo. Por efike bridi epidemion, la Ministerio de Publika Sano faris politikon "preni preventon de epidemioj kiel ĉefan kontraŭrimedon" kaj zorgas precipe pri infanoj. De la 70-aj jaroj, Ĉinio ekpopularigis laŭplanan imunigon por infanoj. En la tuta Ĉinio oni aplikas ĉefe vakcinojn de Calmette-Guerin (BCG) kaj vakcinojn kontraŭ poliomjelito, kokluŝo, difterio, tetanoso kaj morbilo. Post longtempa uzado oni vidas, ke tiuj vakcinoj ne nur estas efikaj, sed ankaŭ sekuraj kun malgranda flankefiko. Gepatroj kunportas infanon al difinita kuracejo por vakcinado. Preventa vakcinado dividiĝas en du specojn: unua vakcinado kaj refoja vakcinado. Tio multe fortigas imunicon.

Nun en Ĉinio oni stariĝis administran organizon de laŭplana imunigo por doni konsultiĝon kaj establis sistemon de fridigo kaj transporto de vakcinoj por garantii ke vakcinado sukcesos kaj morbokvanto de infektmalsanoj iom post iom falos. En 1988 kaj 1990 en Ĉinio 85% da infanoj ricevis vakcinadon, kaj disvastiĝo de novaj vakcinoj utilas al brido de infektmalsanoj. Ekz. nun nemalmultaj urboj injektas vakcinojn al infanoj kontraŭ hepatito B. Oni kredas, ke la nunaj infektmalsanoj ne plu endanĝerigos nian novan generacion. ■

\*La aŭtoro estas ĉina epidemiologo.

# Sanprotekto en vintro

**V**INTRE oni tre facile suferas de iuj oftaj malsanoj. Kial?

La san-protekta teorio de la ĉina medicino montras, ke vintre ĉio sin kaŝas kaj ankaŭ la vitala energio *jīn* en la homa korpo tendencas al vigliĝo, dum la vitala energio *jāng* malvigliĝas kaj pro tio oni estas facile atakita de multaj malsanoj. Oni devas obei la naturajn leĝojn kaj doni grandan atenton al protekto de *jīn*, ĉar vintro koncernas la renojn, kiuj havas striktan rilaton kun la homaj kresko, generado, fortikiĝo kaj seniliĝo, tial protekto de la vitala energio en la renoj estas bazo de la sano kaj prokrasto de la senileco.

Por toniki la renojn oni devas atenti antaŭ ĉio la regulojn de siaj ĉiutaga vivo, trinkado, manĝado, ripozo kaj laboro.

Por tio la manĝaĵoj ne devas esti tre salaj, ĉar salo malutilas al la renoj. Tiam por modere sin toniki oni povas manĝi bestajn hepatojn kaj renojn, polpon, sepijon, angilon, holoturion, sezamsemojn, arakidsemojn, juglandojn, sojfabojn k.a.

Vintre oni devas esti vestitaj dike, ĝustatempe pliigi vestojn laŭ ŝanĝiĝo de la vetero kaj precipe teni la piedojn en varmo. Ĉar la piedkavoj estas malproksimaj de la koro, al ili cirkulas malpli da sango, kaj plie, la tavolo de graso en la plandoj estas maldika, pro tio por ili estas malfacile konservi varmon, kaj ili estas facile atakataj de malvarmo. Se la piedplatoj suferas de malvar-

mo, tio do malutilas al la tuta korpo kaj kaŭzas malvarmiĝon, doloron en la talio, gamboj kaj ventro kaj eĉ dismenoreon. Tial oni devas varme vesti la piedojn, ofte movi ilin kaj ne longe stari senmove eksterdome. Antaŭ la enlitiĝo oni devas bani siajn piedojn en varmeta akvo kaj forte froti ilin, kio utilas al la sangcirkulado, konservo de varmo, mallaciĝo, dormado kaj rezisto kontraŭ malvarmo.

Oni devas teni sian loĝejon en taŭgaj temperaturo kaj malsekeco, kun aero freŝa kaj oksigeno sufiĉa. Oni devas frue enlitiĝi kaj malfrue ellitiĝi. La ĉiutaga vivo devas esti en ordo.

Necesas preni taŭgajn paŝojn por preventi oftajn malsanojn vintre.

En frosta vintro la haŭto tre facile suferas de malvarmo kaj pro tio malglatiĝas sangcirkulado, kio facile kaŭzas frostabsceson. Por preventi frostabsceson oni devas aktive partopreni sportojn por fortikiĝo, glata sangcirkulado kaj leviĝo de la rezistpovo kontraŭ malvarmo kaj malsanoj. Vintre oni ne devas porti tre mallarĝajn ŝuojn. Atakite de frostto, la manoj kaj piedoj ne devas esti varmigataj tuj apud fajro nek lavitaj per varma akvo. Estas popoldiro: efike kuraci somere la malsanojn okazintajn vintre. Por kuraci frostabsceson oni povas somere pisti ajlon, varmigi la pistaĵon sub la suno kaj per ĝi ŝmiri la korpoparton de frostabsceso, tio preventas la recidivon

de frostabsceso.

Vintre la malvarma klimato malfortigas la funkciojn de la supra spirkanalo, kaj sekve de tio patogenaj faktoroj, virusoj kaj bakterioj kaŝitaj en la spirkanaloj do atakas la organismon kaj kaŭzas infektigon al la supra spirkanalo kaj recidivon de trakeito. Por preventi trakeiton oni devas fari konvenajn sportojn kaj lavi la vizaĝon per malvarma akvo cele levi la rezistpovon kontraŭ malvarmo kaj krome, ankaŭ multe sin sunumi, spiri freŝan aeron, preni malpli da akraj manĝaĵoj, sed pli da nutroriĉaj legomoj kaj fruktoj, kiaj rafano, tomato, piro kaj oranĝo.

Vintre gripo furiozas. Tio estas ĉefa kaŭzo de trakeito kaj graviĝo de iuj malsanoj. Preventi gripon ja estas grave. Jen simpla, tamen efika metodo: fermi la pordon kaj fenestrojn antaŭ enlitiĝo, vaporigi vinagron en potoj, por ke la vaporigita vinagro saturu la aeron de la ĉambro. La kvanto de la vaporigita vinagro estas 6-12 ml por ĉiu kubmetro. Faru tion unufoje ĉiutage, po unu horo. Tion faru 3-5 fojojn kontinue.

Vintre la mezaĝuloj kaj maljunuloj devas fari ĉion eblan por preventi cerb- kaj kardiovaskulajn malsanojn. Ili devas doni grandan atenton al evito de malvarmo kaj konservo de varmo, ĝustatempe pliigi kaj malpliigi vestojn, porti malstriktan veston por ke la sango facile cirkuladu, racie reguligi ĉiutagan vivon, ne preni tro da oleozaj kaj dolĉaj manĝaĵoj, preni nutroriĉajn kaj delikatajn manĝaĵojn, ne fumi, nek multe drinki, nek tro laciĝi. Ili estu ĉiam kvietaj kaj bonhumoraj, ne koleru, nek malpacienca, nek mornu. Kaj necesas por ili ankaŭ atenti ŝanĝiĝon de sia malsano, regule viziti kuraciston kaj preni konvenajn medikamentojn por eviti graviĝon de la malsano. ■

# Griloj sur folioj

Pekino, unu el la famaj produktaĵoj de jadoskulptaĵoj en Ĉinio, ĝuas reputacion pro sia delikata prilaboro de bonkvalita jado.

En skulptado oni lerte utiligas naturajn ecojn de materialo. Farita el brilkolora

Hotan-jado, la skulptaĵo "Griloj sur folioj" estas 45 cm. alta. La artisto skulptis unue botelon el jado, poste tigojn kaj foliojn ĉirkaŭ la botelo kaj poste grilojn sur ili. La metiartaĵo posedas naturan strukturon, racian aranĝon kaj versimilajn figurojn.



Floro  
de **Y. MURAMATU**  
(Japanio)



Stepa papaveto  
de **NASER**  
**ASGARZADGAN**  
(Irano)

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》一九九八年第十一期

(本刊代号：二一九一五) 国内统一刊号：CN11 1339/C